

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 103, oktobro 2012

Proverbo: Kiu pace hejme restas, bonan pilgrimon festas

Adreso de redakcio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio (00355682580758; bselimi@gmail.com)

Kunlaborantoj: Shaban Hasani (00355682080677, shabanhasani@gmail.com); Gjergji Gusho (00355682703259; gjergji_gusho@yahoo.com) Agim Peraj (355694472430, agimperaj@yahoo.it); Sajmir Beqiraj (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com); Nehat Sokoli (+355682587699, nehatsokoli@yahoo.com); Engjell Gusho (00355692350111, engjellgusho@yahoo.com), Rita Permeti (0035542363 360; 00355686857800 ritapermeti@yahoo.com),

Enhavo

NI kaj ILEI, AIS, UEA

Elektronikaj libroj malrapide progresas en Esperantujo

Elektronikaj libroj en Esperanto estas publikigataj ĉefe de tri eldonejoj: Sezonoj en Ruslando, Flandra Esperanto-Ligo en Belgio, kaj Mondial en Usono.

Por sondi la staton de la merkato, Libera Folio petis respondeculojn de la tri eldonejoj respondi al kelkaj demandoj pri la temo. Por FEL respondis Paul Peeraerts, por Sezonoj Aleksandr Korĵenkov kaj por Mondial Ulrich Becker.

La demandoj estis:

- Kiel multajn elektronikajn librojn vi eldonis?
- Kiuj el ili ĝis nun estis plej popularaj? Kiom da ekzempleroj estis venditaj aŭ elŝutitaj?
- Kiel vi decidis la prezon de elektronikaj libroj?
- Ĉu vi disponigas senpagajn specimenojn el la libroj? Se vi disponigas tute senpagajn librojn, kial vi faras tion?

- Kiun teknikan solvon vi uzas por la vendado de la libroj?
- Ĉu vi opinias utila, ke ekzistu servo, tra kiu oni povus aĉeti ĉiajn esperantlingvajn elektronikajn librojn

de diversaj eldonejoj? Se jes, ĉu tia servo laŭ vi prefere estu iu el la jam ekzistantaj neesperantistaj retaj librovendejoj (kiu?), aŭ aparta, esperantista servo?

- Kiujn avantaĝojn kaj malavantaĝojn havas paperaj kaj elektronikaj libroj en la Esperanta libromerkato?
- Kiel vi vidas la estontecon de eldonado en Esperanto, specife rilate elektronikajn librojn?

La tuta artikolo estas legebla en Libera Folio:

<http://www.liberafolio.org/2012/elektronikaj-libroj-malrapide-progresas-en-esperantujo>

fonto: Ret-Info

<http://www.eventoj.hu>

Retpoŝta novaĵservo kun selektitaj E-novaĵoj, RET-INFO : <http://www.eventoj.hu/>

Kara, dankon pro la mesagxo, kie enestis interesaj ideoj. Dankon ankaux al samideano Renato cxiam pretpreta helpi, aparte la esperantistojn el malricxaj landoj.

Ni pripensos kio estas bezonata anticipe de ni por arangxi tutlandan kunvenon, kvankam en mia letero al vi mi sugestis kelkajn demandojn niajn.

Mi jam respondis pozitive al vi rilate la publikigon de la prelego de mia profesoro Aleko Minga, do vi rajtas fari tion.

Bv pacienci iomete cxar mia patrino kara dauxre kuxas sur lito kaj mi cxiutage pasigas longajn horojn helpante mian fratinon kiu dejxoras cxe sxi.

Ni restu en kontakto. Salutojn, Bardhyl

2012/8/26 Aurora Bute <a_bute@yahoo.com>

Estimata Bardhyl,

La Europa Komisiono alte pritaksis vian raporton pri la E-agado en Albanio. Precipe ili menciis ke vi pretas organizi nacian kongreson, por kunigi la esperantitojn de la lando.

Renato Corsetti proponis ke la EK starigu projekton "Albanio", kiun mi kunordigu.

Mi pretas fari tion, sed kun via helpo.

Mi pensas tiel: vi organizu la tutlandan vian aranghon, kaj tie, kun kun chiuj viaj samlandanoj, decidu pri la farendajhoj en via lando kaj poste ni decidu la konsiston de la projekto.

Cetere, kiam okazos la evento?

Intertempe, mi havas peton al vi: kune kun la raporto vi sendis al mi interesan materialon titolita Meditado pri la raporto scienco-arto.

Mi shatus aperigi ghin en nia revuo ES-TO, kiun mi redaktas.

Chu vi akceptas?

Se jes, mi restos dankema.

Amike,

Aurora

Cetere, vi povas sciigi en via kongreso ke mi pretas fari la revuon ES-TO oficiala organo de la 4 landoj pri kiuj mi respondecas: Albanio, Bulgario, Makedonio kaj Rumanio.

Kara Agim, espereble vi bonfartas. Gratulojn okaze de koemncigxo de la nova lerneja jaro.!

Delonge la estraro de UEA tra prof. Corsetti ekinterestigxas ankaux por nia movado. Lastatempe la ties

komisiito, frauxlino Aurora Bute petis de mi helpi sxin en la kompilado de fluffolio por albanoj, per kiu ni propagandus nian aferon enlande.

Mi pensis ke tion plejbone farus gxuste vi, cetere pentristo.

Do, pripensu cxi tiun ideon, kreu flugfolion propagandan en la albana kaj sendu gxin al Aurora. Poste sxi zorgos ke UEA eldonu gxin en certa kvanto kaj sendu al ni.

Mi sugestas ian strukturon pli konkretan kiel jene:

Unua pagxo

Kio estas Esperanto en sia 125 jarigxo enmonde kaj 105 jarigxo en Albanio

.

Kiuj estis la unuaj esperantistoj albanaj, la unua libro en Esperanto cxe ni. Menciu la laste eldonitajn librojn (Hunda Hauxto, Skanderbeg).

Kio estas la Albana Esperanto Ligo kaj ties sekcioj (Instruistoj, Junularo). La retadreso, telefonnumeroj, stratadreso, retpagxoj.

Dua pagxo

Kial Esperanto ne nur malhelpas sed kontrauxe plifaciligas la lernadon de la ceteraj fremdaj lingvoj flanke de gestudentoj kaj aparte de ordinaraj homoj.

Kian estonton havas tiu lingvo?

Kiamaniere oni povas konatigxu kun Esperanto? Retaj lernokursoj, lenolibroj kaj sxlsiloj por albanoj.

Tria pagxo

Iom dda Esperanto, 16 reguloj, ks.

Kvara pagxo

Fotajxoj el aktivecoj en kaj eksterlande.

Alvoko por membrigxi en AEL kaj ties strukturoj (Junulara ks)

Cetere ni devas pripensi por arangxi tutlandan kunvenon kie cxeestos ankaux sendito de UEA. Dume ni devas finalizi la procedurojn de legxigo de nia movado cxe la jugxejo. UEA promesis helpi ankaux cxirilate.

Ni restu en kontakto, Bardhyl

Renato Corsetti <renato.corsetti@virgilio.it>

de:Informofico de AIS <informo@ais-sanmarino.org>

Saluton,

la 33-a Sanmarineca Universitata Sesio de AIS San-Marino sukcese okazis en Varsovio (PL). AIS konsideras ĝin modesta kontribuo al la 125-a jaro de Esperanto.

Raporto troveblas en la AIS-retejo: <http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus33/index.html>

SUS 33 estis aranĝo malgranda, jam pro la mallonga prepartempo; nur fine de majo ĉiuj kondiĉoj estis certigitaj. Oficiale aliĝis 15 AIS-anoj, el kiuj unu ne povis alveni pro vizaj problemoj. Krome ĉeestis proksimume la sama nombro da lokanoj (anoj de WSZ-SW kaj aliaj interesuloj, precipe esperantistoj), de kiuj AIS ne postulis oficialan aliĝon.

Sincerajn salutojn,
Reinhard Fössmeier,
senata sekretario de AIS

P.S: Kiel aldonajeton mi sendas bildon de varsovia buso en Zamenhof-strato, kiu veturas al "Esperanto" (-strato). Gi trafikas ĉiujn dek minutojn, semajnfine ĉiujn 15. La foton mi faris proksime de la eksa domo de d-ro L. L. Zamenhof.

--

renato corsetti
via del castello, 1 it-00036 palestrina, italujo
renato@esperanto.org

Saluton!

Hierau mi unuan fojon cheestis la kurson de la albana lingvo. Mi iris per trajno al Gotenburgo. Ni estis kvar lernantoj, du junaj knabinoj, viro ĉirkau 35-40-jara kaj mi, maljunulino! Nia instruistino estas sufiche juna virino, sociologiistino, kiu krome estas trejnistino de futbalo.

La aliaj lernantoj ĉiuj jam estis en Albanio kaj/au havis albanajn amikojn au parencojn. Nu, via lingvo shajnas tre malfacila por mi.

Chu trovighas retkurson por albanoj en esperanto? Mi vidis, ke lernu.net ankoraŭ ne havas la albanan inter siaj multaj lingvoj. Mi achetis lernolibron, kiun ni uzos dum la kurso. Tiu libro estas en la angla, ĉar ne trovighas libro en la sveda.

Espereble mi povos baldau skribi al vi kelkajn frazojn en la albana :-)

Amike



Bardhyl Selimi bselimi@gmail.com

23:22 (0 minutes ago)

to Birgitta, bcc: selimiabardhyl

Gratuloj kara pro via iniciatemo ankaux por lerni lingvon kiel albanan. Certe mi sendos helpmaterialojn por la albana en Esperanto, inkluzive la lernokurson de Esperanto por albanoj kompilite de mi. Cxu logxas en via urbo iu albano ku eventuale povus helpi vin por prononciado de la albanaj sonoj?

Reciproke mi volus konatigxi iomete kun la sveda, certe per via helpo.

Ni restos en kontakto, dankeme Bardhyl

rdhyl, bcc: Shaban

Kara Murat, espereble vi bonfartas.

Pasis jam 7 semajnoj ekde via ekspresa vizito en Tirana. Mi bedauxris ke vi ne trafis min tagon de alveno en Tirana. Shaban Hasani ricevis vian telefon Alvokon tagmeze kaj tuj alvenis en la motelon ne trovante vin pormomente. Cxar estis varmege li revenis hejmen, kiam sekvis dua via telefon Alvoko, sed Shaban ne povis veni denove en la motelon piede. Dume vi forlasis Tirana-n kaj iris al alia urbo.

Kiel ajn, cxu vi gxuis la viziton en Kosovo kaj Albanio? Kiajn impresojn vi havas pri tio? Se eble sendu ilin ecx kurte por ke ni inkludu en nian Bultenon aperonta post kelkaj tagoj. Mi atendas.

Cxion bonan al vi, amike Bardhyl



Murat Ozdizdar

11:59 (3 hours ago)

to me

Kara amiko,

Mi venis kun geamikoj , kaj ni vere fartis bonege en via lando. Ni iris al la urbocentro de Tirano por sxangxi monon post kiam ni vokis sinjoron Hasan. La tempo rapide pasis kaj kiam ni revenis al la motelo, oni diris al mi ke li foriris antaŭ 5 minutoj... Do ne gravas... ni povis viziti Tiranon memstare... tre placxis al ni Tirano kaj bonege vespermangxis en la restoracio "ODA"

Ni poste vizitis Berat kaj tie restis du tagojn kun bonegaj impresoj kaj ecx eksciis ke estas multaj komunaj vortoj en la turka kaj la albana lingvoj...

Post eni ekis al Dermi kaj trovis belegan lokon por nagxi.

Posta tago ni daurigis al Himara kaj ne sukcesis trovi motelon en malnova Himara kaj per taksio ekis al Girokastro... Tie ni pasigis du belegajn tagojn... Ni kontaktis sinjoron Bejleri tie... kune trinkis kafon sed ne sukcesis paroli E-on bedaurinde.

La venonta tago ni veturis al Pogradec... Ni kontaktis sinjoron Gjergji Gusho... kiu komence ne sukcesis paroli E-e sed post 15 minutoj jam estis inetrkomprenigxo nur Esperante... Post eni piede iris al la landlimo de Macedonio...

Vere estis neforgeseblaj tagoj en via belega lando... Mi planas reviziti kaj kontakti vin kaj aliajn lokajn esperantistojn...

Amike

Murat

From: Bardhyl Selimi [mailto:bselimi@gmail.com]
Sent: Friday, September 21, 2012 9:31 AM
To: Murat Ozdizdar
Subject: Kiel vi fartas

Nia propagando

Karaj Geamikoj!

Membro de la Hungara Scienca Akademio, Profesoro D-ro Ottó Haszpra, kiu mortis antaŭ kelkaj monatoj, en la fruaj jaroj de la XXI-a jarcento pretigis statistikon pri la kostoj de la lingvolernado en membroŝtatoj de EU. Laŭ Liaj kalkuloj la kostoj de la lingvolernado estas en EU ĉiujare inter 140 kaj 193 miliardoj da eŭroj. Li sendis sian laboraĵon al pluraj ĵurnaloj, politikistoj, ktp. Fine okazis nenio.

Mi serĉis en mia "arkivo" la malnovan prelegon de Ottó, - espereble Vi povos malfermi kaj legi ĝin. Tiu ĉi teksto troviĝas ankaŭ en la kolektaĵo proponita de S-ro Petro Chrdle. Bonvolu kompari la tieajn donitaĵojn kun tiuj de S-ro Johano Kossey. Vidu sube...

En Hungario nun la angla lingvo estas subtenata. En la Radio Kossuth ĉiusemajne diras iu la frazon: - "Nuntempe ne kalkuliĝas kulturita homo tiu, kiu ne parolas angle."

Ĉiuokaze ni devas daŭrigi nian agadon, por ke la homoj fine komprenu, ke helpe de nacia lingvo neniam povas ekzisti lingva egalrajteco.

Mi mem ĉiam parolas pri la planita/reformita lingvo BAHASA INDONESIA, kiun parolas jam pli ol 200.000.000 homoj en Indonezio.

Pri tiu ĉi lingvo - espereble - baldaŭ parolos en nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo S-ro D-ro Georgo Nanovfszky, iama hungara ambasadoro en Singapuro.

Kun plej amikaj salutoj

Ludoviko

-----Original Message-----

From: Ivan Kossey [mailto:ikossey@rambler.ru]

Sent: Sunday, August 12, 2012 8:34 PM

To: ludoviko@t-online.hu

Subject: Pritakso: kostoj por fremdlingvoj

Kara Ludoviko!

Jen mia pritakso por kelkaj eŭropaj landoj, kiom kostas instruado de fremdlingvoj. Ĉu ekzistas alia pritakso kaj ĉu gi konkordas kun mia?

En usonaj dolaroj

Germanio 15,207 mlrd \$

Francio 15,077

Italio 9,572

Hispanio 5,911

Nederlando 4,160

Svislando 3,866

Belgio 2,676

Svedio 3,290

Norvegio 3,184

Aŭstrio 1,868

Danio 2,589

Finnlando 1,508

Portugaliao 1,275

Irlando 980 mln.\$

Hungario 675 mln.

entute 71 mlrd \$

krome, por Rusio 8 mlrd. da dolaroj

Fontoj:

http://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_GDP_%28PPP%29

Tamen mi prenis similajn datojn el la rusa Vikipedio, tie estas iome aliaj datoj (eble el pasinta jaro), sed la diferenco ne estas granda.

Procentaĵo por klerigado

http://stats.uis.unesco.org/unesco/TableViewer/tableView.aspx?ReportId=3560&IF_Language=eng

Mi kalkulis, ke oni elspezas por fremdaj lingvoj 10% de buĝeto por klerigado laŭ Francois Grin. Tiu cifero estas la plej dubinda kaj certe ŝanĝiĝas por ĉiu lando. Por pli ekzaktaj ciferoj oni bezonas fari pli detalan eksploradon.

Certe, tiuj nombroj povas diferenciĝi je 20-30% de realeco.

Tamen tiu statistiko estas timinda. Ĉu ne estas ankoraŭ unu rezono por

Esperanto?

Korajn salutojn

Kossey Janos

--

Ni dankas

Ni dankas La Hirosiman Esperanto Asocion kiu donacis tri ekzemplerojn de la nova ilustritav gvidlibro pri Hirosima je titolo "Sciu pri pri Hirosima".

Rita Permeti

de: dennisinparis <keefeinchina@gmail.com>

La Universitato de Esperanto naskighas

IA 0-Jarigho

Resumo: 164 vortoj. Detaloj: 586 vortoj.

RESUMO pri www.universitato.info:

Dank' al la kuraghigaj vortoj de Renato Corsetti en chi tiu UEA-Membro-diskutejo en la lastaj jaroj, kaj dank' al la longa, senpagita kaj profesia laboro de Profesoroj Ron Glossop el Usono kaj Federico Gobbo el Italujo, la Universitato de Esperanto ekestighas, kaj nun, per la prototipo-retejo www.universitato.info videblas senpage kaj senvojaghe. Kelkaj Esperantistoj povas ghoji, ke ili nun povas lerni kaj studi, PER Esperanto, universitatajn temojn pri ne-esperantaj aferoj. Aliflanke, Ne-Esperantistoj nun devas almenau agnoski, ke KOMPLETAJ, universitataj kursoj tute en Esperanto eblas kaj okazas en la jaro 2012. Restas multe da laboro, kaj la sonkvalito kaj vidkvalito de la Universitato de Esperanto restas sub tiu de Yale, Berkely kaj Harvard, tamen ni Esperantistoj faris chion sen subvencioj dum en iliaj manoj estas dekmilionoj da dolaroj por antauenigi siajn « open course » projektojn en la angla lingvo. Se vi volonte volas partopreni la projekton Universitato de Esperanto, kaj vi estas profesoro, au povas kontribui alimaniere (vidu sube), bonvolu kontakti nin ([keefeinchina che gmail.com](mailto:keefeinchina@gmail.com)).

DETALOJ pri www.universitato.info:

En la kadro de la eksperimento Esperanto-Insulo chi frujare ekestighis la unuaj kursoj de la projekto Universitato de Esperanto. Nun kun ghojo ni volas anonci, ke antau kelkaj horoj ni finis la unuajn pashojn

de la prototipo por la retejo de tiu universitato, kie ni listgigos, iom post iom, chiujn kursojn kaj chiujn lecionojn, jam instruitajn al studentoj kaj Esperantistoj sur la insulo Hajnano en Chinio, inter la 11a de januaro kaj la 12a de februaro, 2012. Per la bonvolo de aliaj profesoroj, espereble iom post iom la kursaro de la Universitato de Esperanto plivastighos.

Por vi kiuj emas studi universitatajn temojn, vi jam povas spekti proksimume 15 horojn de lecionoj el du kursoj (chu per Youtube, Ipernity, Vimeo). Post kelkaj monatoj, vi havos la tutajn kursojn, do proksimume 70 horojn de universitataj kursoj. Vi povas lerni pri Filozofio kaj Historio de la Informadiko, instruata de Profesoro Federico Gobbo el Italujo. Vi ankaŭ povas lerni pri la temo paco kaj milito, instruata de Profesoro Ron Glosop, en lia kurso nomata Alfronti Militon.

La Universitato de Esperanto bazighas sur la nuntempaj modeloj de « Open Course Ware », kiel videblaj che la Universitatoj de Yale oyc.yale.edu, kaj de Berkeley webcast.berkeley.edu. Iliaj kaj niaj kursoj estas kompletaj, kun chirkau 40 horoj da lecionoj. Ili estas filmitaj kaj disponeblaj interrete sub la licenco Krea Komunajho. Niaj kursoj en Esperanto estas veraj, lau enhavo, kursoj, kiuj jam antaue instruighis nacilingve che universitatoj en diversaj landoj.

Eble substrekindas la paradokso de la Universitato de Esperanto: ghi ne estas pri Esperanto nek pri Esperantologio. La Universitato utiligas la Internacian Lingvon, sed ghi utiligas ghin por lerni kaj studi nur sciencajn kaj sciajn temojn kiel niaj universitatoj tiel faras tra la tuta mondo. En la Universitato de Esperanto, oni lernas pri historio, filozofio, scienco, ktp, PER Esperanto. Eventuale, kurso pri enkonduko al għenerala lingvistiko bonvenus, sed nur se tiu kurso pritraktos la temon kiel tion farus profesoro che la Universitato de Kalifornio, au instruisto che universitato en Danlando au en Italio, ekzemple.

La Universitato de Esperanto estas juna, sed ghi estas serioza, kaj kunlabora projekto. Por la iompostioma kresko kaj plibonigho de la Universitato, bezonatas pli kaj pli da kapablaj kaj bonkoraj volontuloj. Ekzemple, antaŭ chio, novaj profesoroj kun doktoraj titoloj estas bonvenaj. Se vi estas profesoro kaj JAM instruis vian fakon (historio, filozofio, ekonomiko, astronomio, biologio, psikologio, sociologio, ktp.) che univeristato en via lando, eble vi povas kontribui, reinstruante la saman temaron tute en Esperanto.

Se vi estas bibliotekisto, ni bezonas vian sperton kaj talenton por krei kaj organizi nian venontan bibliotekon. Se vi volas skribi subtitolojn por niaj jam filmitaj kursoj, vi estas bonvena. Se vi povas finprepari la filmitajn kursojn kaj alshuti ilin al Vimeo, Youtube au Ipernity, bonvolu kontakti nin. Se vi povas helpi starigi spegulo-servilon en landoj en Azio au en Afriko au en Sudameriko, vi bonvenas, char loka rapideco de la kurso-filmo kaj elshutebleco gravas.

La celo kaj la misio de la Universitato de Esperanto estas kaj restos simpla: prezenti al Esperantistoj kaj al ne-Esperantistoj universitat-nivelajn kursojn EN, sed ne pri Esperanto, por ke Esperantistoj lernu kaj studu intelektajn temojn per Esperanto, kaj por ke ne-Esperantistoj sciu, ke nia lingvo utiligeblas por uzo che universitata nivelo, kaj ke Esperanto vere vivas.

Se vi interesighas pri kunlaborado kun ni, bonvolu legi unue la Principaron pri la Universitato de Esperanto www.universitato.info/priciparo.htm, kaj post tiu legado, se vi emas, kontaktu nin pri eventuala kunlaboro kun ni: Federico Gobbo, Ron Glossop, Derek Roff kaj Dennis Keefe.

Amike,

Dennis Keefe
keefeinchina che gmail.com
Universitato de Nankino, Chinujo

--

--

renato corsetti
via del castello, 1 it-00036 palestrina, italujo
renato@esperanto.org

— · — · —

Ian Fantom ian@fantom.org.uk

03:27 (6 hours ago)

to me

On Sat, 14 Jul 2012 23:55:05 -0700, Bardhyl Selimi <bselimi@gmail.com> wrote:

> Karaj, iom pli frue cxifoje ni sendas nian regulan dumonatan bultenon,
> bonan legadon, amike Bardhyl

Multan dankon, kaj aparte pro via 'Repondo al Aurora Bute, Tirana, la 6-an de Julio 2012', en kiu vi priskribas la nunan staton de la Esperanto-movado en Albanio.

Se mi estus verkinta raporton pri la situacio en Britio antaux dek jaroj gxi iom similus. Sed la britoj gxenerale ne volas agnoski la veran situacion; anstatauxe ili direktas sian propagandon cxefe internen por "gajni la kredindencon de la komitato", kiel konfesis al mi iama dungita

Direktoro de Evoluigado.

Antaux iom da tempo mi cirkulis raporton 'Kial ni devas stagni?', kiu estis bazita sur prelego ĉe La Londona Esperanto-Klubo en 2010-11-12 sub titolo: 'Kien La Londona Esperanto-Klubo?'. Mallonge dirite - kaj pli rekte dirite - la propagando direktata al la britaj Esperantistoj estas malhonesta. Necesas trarompi tiun fasadon de misprezentoj kaj ecx mensogoj por ke ni povu aliri la problemojn de la Esperanto-movado en Britio. Mi gratulas vin en Albanio, ke vi honeste raportas pri la vera situacio.

Tiu raporto, 'Kial ni devas stagni?' poste aperis en la Interreto cxe:
xa.yimg.com/kq/groups/21807857/1696856509/name/kial_ni_devas_stagni.rtf

Sed kiel nun iri antauxen?

Vi demandas en via letero, cxu UEA helpas. Laux mia sperto, la respondo estas, versxajne ne. Sxajnas, ke UEA suferas similan problemon kiel tiu de la brita movado. La cxefa diferenco estas, ke mi havas tre detalan kronikon pri la brita movado, inkluzive de protokoloj kaj kontoj, raportoj, leteroj kaj simile, kaj mi nun povas definitive diri, ke la membroj estis grandskale trompitaj. Pri UEA mi tion ne havas, sed Johano Derks produktis raporton en kiu li demonstras la evitemon de iuj influhavaj personoj cxe la kerno de UEA en plenumo de decidoj de la gvidantaro: 'Gvidlibreto por komitatanoj 2011 - Telfort' (home.telfort.nl/derks.esp/gvidlibreto%20por%20komitatanoj%202011.pdf).

Sxajnas al mi, ke urgxe estas bezonata internacia agado por solvi la verajn problemojn de la Esperanto-movado. De tempo al tempo la homoj parolas pri 'nova UEA', sed ni devas havi kialon supozi ke iu nova UEA malsimilos al la malnova.

Necesas pli bone kompreni la fundamentajn problemojn de la Esperanto-movado, sed tiuj kiuj provas aliri tiun demandon renkontas obstakladon. Ni devas kunagadi.

Due, necesas reelpensi la tutmondan strategion por la antauxenigo de Esperanto. Esperanto rapide popularigxis antaux jarcento cxar gxi respondis al la veraj sentoj de la ordinaraj homoj rilate al la konstanta interbuxado de la homoj sub misgvido de senskrupulaj kaj krimaj politikistoj. Nun evoluas simila situacio en la mondo, en kiu la homoj lacigxas de la konstanta militado kaj farigxas pli kaj pli malkredemaj kaj

malfidemaj al la politikistoj kiuj gvidas nin en tiujn terurajn militojn. Mi ne opinias, ke UEA helpas al ni tiurilate. Ajna provo ecx diskutigi la temon kondukos al sensenca obstaklado en niaj diskutgrupoj.

Tamen necesas, ke ni progresu tiurilate, preskaux certe ekstere de UEA, kaj eble ecx ekstere de la Esperanto-movado mem. Mi prilaboras tiun ideon en mia lando, kaj mi faras pli da progreso tiurilate ekstere de la Esperanto-movado ol interne de gxi. Britaj Esperantistoj tutsimple ne plu interesigxas pri la zamenhofaj ideoj, sed se ni flankenmetas por la momento la lingvan flankon, la granda plimulto de la brita publiko ja subtenas ilin. Tie estas nia nova merkato.

Mi esperas, ke tiu cxi kontribueto semos kelkajn semojn, el kiuj povos eventuale kreski nova Esperanto-movado.

Kore salutas lan.

Ege dankon kara, kaj ege pardopeton pro tiu fuxajxo mia, kiun mi ne envere intencis cxar mi jam konas ke vi ne estas prezidanto de AIS. Mi korektos tion plejkonvene. Vi pravas kiam vi diras ke mi uzu PDF programon, tion mi faris antauxe sed post reprogramado de komputilo mi perdis la programon. Mi provos denove.

Cxion bonan al vi kaj Alicja. Amike Bardhyl

2012/7/15 Informofico de AIS <informo@ais-sanmarino.org>

Je 2012-07-15 08:55 Bardhyl Selimi skribis:

Karaj, iom pli frue cxifoje ni sendas nian regulan dumonatan bultenon, bonan legadon, amike Bardhyl

Estimata,

unue mi dankas, ke vi nun dissendas vian bultenon kaŝante la adresojn de la ricevantoj. Tio estas tre bona praktiko.

Sed je mia teruro mi vidis, ke vi publikigis retmesaĝon mian al s-ro Andreo Grzębowski pri SUS 33 (de 2012-07-10) kaj en la subskribo nomas min "prezidanto de AIS". Mi ne estas prezidanto kaj ne tiel

subskribis, kaj mi estas iom en embaraso pro tiu subskribo. Bonŝance la vera prezidanto, OProf. Maitzen, ricevis kopion de la mesaĝo, do scias, ke tiu subskribo ne estas de mi.

Eble estus pli bone, se estonte vi interkonsentus kun la aŭtoroj de retleteroj pri la publikigo.

Ĉion bonan,
Reinhard Fössmeier

P.S: Por pli facile legi en via bulteno mi konvertis ĝin al la formo PDF (per la senkosta programo LibreOffice), kaj la rezulto havas nur 1,4 Mo, do nur du kvinonojn de la originala vorda dokumento (doc). Krome PDF estas legebla ankaŭ sen havi Vordon aŭ LibreOffice. Eble vi konsideru dissendi vian bultenon kiel PDF-aĵon?

Interesa ideo kara, Esperanto Albanujo tradukigxas Esperanto Shqiperia.

Mi disvastigos la ideon cxe nia komunumo, dankon Bardhyl

2012/7/15 Renato Corsetti <renato.corsetti@virgilio.it>

Kara Bardhyl,

vai bulteno estas kiel kutime tre interesa. Kiel oni diras en la albana "Esperanto Albanujo"? Mi kredas, ke la nuna situacio de la organizaĵoj en Albanujo estas favora por lanĉi la novan "Esperanto Albanujo" laŭ la modeloj de Esperanto France, Esperanto USA, Esperanto Nederland, ktp. kiu organiziĝas pli laŭ agadoj ol laŭ burokrataĵoj.

Ni pluparolu pri tio.

Amike

Renato

PS. Ni provu ligi ĉiujn albanajn esperantistojn, kiujn vi konas al ĉi tiu listo [se vi sendas la adresojn, mi ligos ilin al la listo], tiel ke ili povus interkonsenti pri kunlaboro ĉi tie.

--

renato corsetti
via del castello, 1 00036 palestrina, italujo
renato@esperanto.org

—'-'—

Reply to sender | Reply to group | Reply via web post | Start a New Topic

Messages in this topic (2)

RECENT ACTIVITY:

Visit Your Group

~~~~~

Legeblas che

<http://www.liberafolio.org/Members/cneidorf23/indiana-kooperativa-grupo-adoptas-esperanton-kiel-laborlingvon>

La Indiana Kooperativa Grupo, transnacia organizajho en kunlaboraj rilatoj kun Intraespo kaj lanchintoj de Kiberio, decidis adopti Esperanton kiel laborlingvon.

La Indiana Kooperativa Grupo, transnacia organizajho en kunlaboraj rilatoj kun Intraespo kaj lanchintoj de Kiberio, decidis adopti Esperanton kiel laborlingvon. Mi trovis tiun chi informon en Virtuala EsperantoKlubo sed la membroj de la Grupo detale informas pri sia decido en la Indiana Kuriero. Ili prezentas plurajn kialojn kaj fine konkludas:

ni indianoj komencis antaŭ du semajnoj studi kaj uzi Esperanton en la nia labortablo por debati kaj labori. Kiu lingvo povus esti pli bona ol sinteza lingvo por komunumo kiu unuigas pro ideoj kaj projektoj, ne pro originoj, «ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj». Esperanto estas por ni: sinteza lingvo por sinteza komunumo.

Agoj

Temas pri aplikado de Esperanto kiu, bedaŭrinde, tre maloftas ĝis nun !

”Provoko por /soci/ekonomistino kun fido al estonteco.”

Barakti, barakti, barakti --- ne kuŝiĝi por plori. Rozana estas al kutimiĝinta pene klopodi, kaj nun ŝi, kiel ekonomikistino, alfrontas la malfacilan taskon trovi laboron. -Mia celo estas havi dungon ĉe la ŝtata (nacia) banko. Nenio estas neebla, se oni havas ĝustan (veran) volon, ŝi diras.

Rozana devenas de mezklasa familio en Albanio. La patro estis oficiro, la patrino estis instruistino. Rozana havas fraton kaj fratinnon.

-Albanio estas malriĉa lando, sed al ni ne mankis la plej gravaj. Mi tamen ne povis havi ĉion, kion mi volis. Mi povis aĉeti paron da novaj pantalonoj kaj paron da ŝuoj ĉiujare. Kelkfoje mi aĉetis malnovajn (uzitajn) vestojn, rakontis Rozana.

Ŝi tamen estis kontenta, bone fartis, havis normalan kaj trankvilan junaĝon, ŝi sukcese trapasis la lernejojn kaj havis altajn atestojn.

Kiel oficiro la patro devis adaptiĝi al novaj forkomandoj. La familio ŝanĝis loĝejojn kvinfoje dum la junaĝo de Rozana de urbeto en la nordorienta parto kaj por la tempo venis al la ĉefurbo Tirana, kiam ŝi havis 16 jarojn.

Rozana memoras, ke estis penige veni al novaj kaj pli grandaj urboj. La postuloj en la lernejoj estis pli altaj, kaj ŝi devis lerni (energie) laboradi kaj ne rezigni.

-En Tirana miaj geavoj loĝis kune kun ni, kaj ni estis sep personoj en propra domo. Mi studis (prepariĝis) por ekonomikista kariero ĉe la universitato. Mi tre ŝatas ciferojn kaj volonte legas tion, kion mi bezonas por trapasi ekzamenojn.

Prefere ŝi volis labori ene en la ŝtata administrado en Albanio. Sed tio montriĝis preskaŭ neebla sen subaĉeti, kaj tio ŝi ne emis fari. Koruptado estas disvastigita en la lando. Bonaj kontaktoj kaj mono malfermas pordojn, precipe al ŝtataj oficoj. Povas kosti jarsalajron ekvivalentan al 30000-40000 kronoj (3000-4000 Eŭroj) por ricevi oficon.

Oni alvokis ŝin al intervjuoj, ŝi faris testojn sed la laborojn ĉiam ricevis alia persono.

-Mi sentis min malplivalorigita. Miaj studkamaradoj, kiuj ne faris same bonajn rezultojn kiel mi ĉe la universitato, ricevis laboron.

Rozana laboris dum jaro en (hazard?) ludkompanio. Iom post iom ŝi havis pli grandan respondecon por administraj taskoj.

La someron 2007 ĉio ŝanĝiĝis. Si renkontis Muj-on, kiu havis svedan restadpermeson. Li loĝis en Lidköping kaj estis en sia malnova hejmlando, Albanio, pro ferioj. La paro fianĉiĝis en septembro saman jaron.

Ŝia estonta edzo multe parolis pri Svedio, pri siaj geamikoj, pri lando de eblecoj, kie ĉiuj povas realigi siajn revojn, pri alta vivnivelo, rajtoj por ĉiuj, belaj urboj kaj lagoj.

Muj memoras, ke komence Rozana ne interesiĝis pri tio.

-Mi tre baraktis por mia edukado kaj ne volis forlasi mian familion, sed la amo igis min fari la paŝon, diras Rozana.

Ŝi ricevis permeson veni al Svedio, kaj ŝi alvenis en majo 2008. Estis ŝia unua vojaĝo eksterlanden.

-Lidköping estas io alia ol mi atendis. Mi pensis, ke la domoj estas pli altaj, ke la homoj estas pli multaj. Mi vidis malplenajn stratojn. Mi sentis min sola sen familio kaj geamikoj. Ĉi tie estas granda distanco, malvarmo inter homoj. Mi, kiu estas kutimigita al deproksima kontakto, kisoj kaj brakumoj. Ankoraŭ mi ne kontentiĝis per tio.

Ŝi baldaŭ trovis, ke homoj en ludomoj povas loĝi muron ĉe muro kaj nur kapsigni por saluti. En Albanio tio estas neimagebla. Najbaroj interrilatas, kafumas kaj babilas.

Sveda pano estas tro sukergusta. Pro tio ŝi mem bakas. Ŝi manĝas svedajn viandbuletojn sed ne haringojn.

Post kvar tagoj en Lidköping ŝi komencis studi la svedan lingvon.

-Mi vizitis lernejojn dum 16 jaroj sed mi devis rekomenci de nulo. Mi cerbumis pri tio, kion mi faris kun mia vivo. Mi devis lukti, mi ne povis enlitiĝi por plori.

Pri la valideco de mia edukado al ekonomikisto de Albanio la svedaj aŭtoritatoj jam konfirmis.

Rozana dum ses monatoj faris preparan edukadon por ekzamenitoj de universitatoj, kaj ŝi i.a. studis komputoran teknikon, civitanan edukadon kaj la svedan lingvon.

Ŝi faris staĝon ĉe revizora agentejo dum tri monatoj, studis kalkula raportadon pri salajroj, vendadon, aĉetakiron, dumtempe studis la svedan kun bona rezulto dum du semestroj anstataŭ kutime kvar. Kaj dum la kvar jaroj en Lidköping ŝi naskis du geinfanojn.

Nun ŝi havas staĝokupon ĝis septembro. Ŝi ne scias, kio estos poste. Ŝi substrekas, ke ŝi sentas sin forta kaj trankvila kun la edukado, kiun ŝi akiris. Krome ŝi volonte plustudos ĝis masternivelo (magistra (?) nivelo).

-Mi volas labori kaj ricevi salajron kaj senti, ke mi havas valoron. Sed kiam mi serĉas oficojn kaj sendas mian CV (liston de meritoj), la dungantoj rigardas mian familian nomon kaj tuj formetas la paperojn. Mi serĉis oficon en Lidköping, Gotenburgo kaj Malmo kaj oni eĉ ne invitis min al intervjuo, ŝi konstatas kaj

daŭrigas: La dungistoj ne kredas, ke mi scipovas la svedan kaj ke mi estas ne socia (?). Mi sentas min diskriminaciita en la labormerkato, kaj tio estas ege ĉagrena.

Ŝi havas geamikojn, kiuj ŝanĝis siajn familiajn nomojn por altigi laborŝancojn.

-Tion mi ne intencas fari, diras Rozana.

Oni akceptis ŝin por kurso al ekonomikisto de kalkulraportado en Lidköping. 106 serĉis, 32 estis akceptitaj.

-Se mi ĝis septembro ne ricevos laboron, kie mi nun staĝas aŭ en alia kompanio, mi komencas studi.

Rozana substrekas, ke oni traktas ŝin bone en Lidköping. Kiel privata persono (individuo) ŝi ne sentas sin aparte aŭ maljuste traktata. Ŝi havas i.a. multajn geamikojn en la pentekosta preĝejo en Lidköping.

speranto Radikala Asocio

Brazilo agnoskis Esperanton kiel laborlingvo. Kiel Radikaluloj ni laboras por ke ĝi estu eŭropa federacia lingvo.

«La brazila Ministerio pri Laboro agnoskis Esperanton kiel laborlingvo kaj la unua, kiu profitis je tio, estis la turista gvidistino Laura Pereira de Alcantara. Ĉi tio estas bona viatiko por Brazilo, konsiderante ke en Eŭropo la laborlingvoj angla, franca kaj germana iĝis la veraj oficialaj lingvoj de la Unio» komentis amare por la eŭropa situacio la Sekretario de ERA.

«Estas bonega sciigo por ni Radikaluloj, kiuj ekde longa tempo agnoskas en Esperanto rajton de la homaro, kiel memorigas ankaŭ la fina mocio de la lasta Kongreso de la Radikala Partio. Nun ni devas havi du celojn, kiuj tenos sin unu per la alia: en Brazilo kaj en Italio restartigi la lingvan agnoskon de Esperanto fare de la Ministerioj pri instruado kaj, en Eŭropo, labori por ĝin afirmi kiel federacia lingvo donante al la eŭropaj civitanoj la eblecon senti sin patriotoj eŭropaj kaj de la lingva demokratio», daŭrigis la radikala direktanto.

«Tiun lingvan demokration kaj justecon ne volis afirmi la usonanoj detruantaj, per ilia lingvo, ĉiujn lingvojn de la amerikaj aŭtoktonaj popoloj. En Eŭropo ni ne povas permesi, ke tio, kio okazis al la lingvoj de la amerikanaj indiĝenaj popoloj, estu realigita de la angla, mortigante ankaŭ niajn lingvojn,

komencante de la itala. Brazilo havas, male, la eblecon eniri la historion subtenante la plej grandan socian novigon, kiun la mondo en ĉi tiu nigra krizo povas koni, deklarante Esperanton lingvo de la homaro kaj antaŭenpuŝante ĝin en ĉiuj internaciaj organismoj, de kiu Brazilo estas parto» konkludis la Sekretario de Esperanto Radikala Asocio.

Romo, la 22an de julio 2012

Legu pli da informoj, komunikoj kaj deklaroj de Esperanto Radikala Asocio je <http://www.democrazialinguistica.it/100/index.php/eo/>

--

-----  
Por sendi mesaĝojn al la grupo, skribu al [esperanto-en-lernejojn@googlegroups.com](mailto:esperanto-en-lernejojn@googlegroups.com)  
Por afiŝigi aliajn elektelecojn, vizitu la grupon je adreso <http://groups.google.com/group/esperanto-en-lernejojn>

Ĉiuj mesaĝoj estas aprobatataj sen filtrado, sed listanoj, kiuj ne respektas la regulojn de la listo, estos avertataj je unua transpaŝo kaj filtrataj ekde dua transpaŝo.

- sama mesaĝo ne estu sendata al pluraj listoj samtempe, sed aparte al la listo
- la vosto (citaĵoj el responditaj mesaĝoj) estu laŭeble fortranĉata aŭ minimumigata
- la temo rilatu al lerneja instruado de Esperanto
- komentoj, kritikoj pri eventuala "malbona lingvo" uzata de mesaĝinto estu sendataj private al tiu, ekster-liste.

Pri-lingvaj, pri-literaturaj diskutoj okazu prefere en aliaj listoj:  
<http://groups.yahoo.com/group/AdE-diskuto>  
<http://groups.yahoo.com/group/Tutmondeca-Esperanto/>

----- Forwarded message -----

From: Stefan MacGill <[stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>

Date: 2012/7/23

Subject: Fwd: (uea: estraro) Fwd: Nova estraro de ILEI elektita

To: Augusto Casquero <[augustocasquero@gmail.com](mailto:augustocasquero@gmail.com)>, Alain Delmotte <[alain.delmotte@leliseron.org](mailto:alain.delmotte@leliseron.org)>,

Márta Kovács <bdg.kovacs.marta@gmail.com>, Peter Baláž <peter.balaz@ikso.net>, Bert Schumann <bert.schumann@gmail.com>, "\"behrlich.esperanto@online.de\""" <behrlich.esperanto@online.de>, Bardhyl Selimi <bselimi@gmail.com>, Bertilo Wennergren <bertilow@gmail.com>, Baldur Ragnarsson <esp@mh.is>, Sebastian Cyprych <sebacyp@jabster.pl>, christine theano <christinetheano@hotmail.com>, Aida Cizikaite <aidute@mail.lt>, bloudek@volny.cz

Nova estraro de ILEI por 2012-2015

Elektoj okazis en Kunmingo en la 24a de julio, 2012, kun 30 validaj komitatanaj voĉoj. Post fermo de proponoj, estis naŭ kandidatoj. La komitato decidis per voĉdono, ke la estraro konsistu el naŭ personoj, el kiuj tri estas elektitaj por specifaj oficoj. Ne eblas anonci taskdividon por la ceteraj lokoj tuj, la kvar ĉeestantaj estraranoj kunsidos hodiaŭ nokte; intertempe ni retbabilos kun la neĉeestantoj, cele al anoncado de provizora taskdivido ene de 24 horoj.

Jen la nova estraro:

Prezidanto:

s-ro Stefan MacGill, Hungario/Nov-Zelando

Sekretario:

s-ro Radojica Petrović, Serbio

Estrarano pri financoj:

s-ro Bill Harris, Usono

Pliaj estraranoj (taskdivido anoncota)

s-ino Gong Xiaofeng (Arko), Ĉinio

s-ro Bharat Ghimire, Nepalo

s-ino Magdalena Feifičova (Fejfi), Slovakio

s-ino Enikő Zengő Sereghy, Hungario

s-ino Penny Vos, Aŭstralio

s-ino Zsófia Kóródy, Germanio/Hungario

Fine de la kunsido, la prezidanto kaj la komitato kore dankis al la malnova estraro pro la farita laboro, ili dankis al la elekto-komisiono pro la modele gvidita elekto-procezo, kaj la komitato bondeziris al la nova teamo.

--

Stefan MacGill

Prezidanto (reelektita), ILEI

--

Stefan MacGill

Prezidanto, ILEI

23 Ian Fantom <ian@fantom.org.uk>

Novaĵletero de la Veromovado de Berkshire, Britio: julio 2012 (2012-07-23)

Berkshire 9/11 Truth

<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)

<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

- \* Milita juro falas sur Londonon
- \* Kiel funkcias gazetara cenzurado per minac-timigo kaj ĉikanado.
- \* Bojkotita kaŝa ĵurnalisto aperas en Londona publika kunveno.
- \* Polico fariĝas parto de korporacia Britio.
- \* Gladio-aŭtoro skribas pri Olimpia teror-risko por Londono 2012.
- \* Gladio revizitita.
- \* Grupo 'Keep Talking' diskutas pri Olimpia fals-flaga risko.
- \* Ĉu Tony Blair povus esti pozicianta sin por gvidi Korporacian Registaron aŭ Faŝistan ŝtaton?
- \* Sekretaj dokumentoj detruitaj en Germanio kaj Britio dum nov-nazioj

riskas malkaŝiĝi.

\* Kiel reagi al eventuala fals-flaga teror-evento en Londono.

Londono iras en la direkton de milita juro. Iuj diras, ke ni jam atingis. Craig Murray estis la brita ambasadoro al Uzbekio ĝis oktobro 2004, kiam li malmaskis britan komplikon en torturo. Li spertis totalismajn reĝimojn, kaj li skribis en blogo titolita 'Martial Law Britain' [Milit-jura Britio] la 12an de julio, "Tiuj kiuj venas el Centra Azio, Bahrejno, Kataro aŭ Saŭd-Arabio al la Olimpiaj Ludoj, kun intereso vidi kiel sentas la vivo en iu demokratio, trovos, ke ĝi ŝajnas esti ĝuste kiel la vivo hejme en siaj diktatorecoj" (<http://www.craigmurray.org.uk/archives/2012/07/martial-law-britain/>).

Depost kiam mi verkis mian junian novaĵleteron la afero de G4S eksplodis en la tradiciaj amaskomunikiloj britaj. Sed ili ankoraŭ multon kaŝas rilate al la tuta ĥaoso ene de G4S en ilia trejn-programo, kiel unue malkaŝis malmaskanto Sarah Hubble, kaj poste kaŝa priesplora ĵurnalisto Lee Hazledean. Sarah skribis al mi por peti helpon: "Mi ĵus starigis retan blogon (<http://sarahhubble.wordpress.com>) kaj mi prilaboras G4S-raporton. ... Mi scivolos, ĉu vi konas iun kiu havas sperton pri G4S aŭ nun laboras por G4S, kiu voleme farus mallongan intervjuon".

La rakonto de la tradiciaj amaskomunikiloj temas ĉefe pri la nesufiĉo en la nombro de varbitoj de G4S sekve de anonco fare de la brita registaro pri la deplojo de 3 500 ekstraj militservistoj por kompensi tiun nesufiĉon, kaj tiu nombro pliiĝas je pluaj 1 200 dum mi verkas tiun ĉi. La ĉefo de G4S, Nick Buckles, asertis, ke li sciis nenion pri la afero ĝis la 6a de julio, kaj la enlanda ministro, Theresa May, asertis, ke ŝi sciis nenion pri ĝi ĝis 11a de julio. Tio estas interesa, ĉar mi sciis pri la ĉiea ĥaoso, kaj aŭskultantoj de la programo 'Friday Drivetime' de Tony Gosling en radio BCfm sciis pri tio la 22an de junio (<http://radio4all.net/index.php/program/60932> – alklaku la butonon 'download' malsupre). Nun ŝajnas, ke la enlanda ministro agnoskis la nesufiĉon en la varbado fare de G4S en letero la tagon post tiu radioelsendo (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2176100>), sed neniu preteriras la sojlon agnoski la ĉiean ĥaoson raportitan en Friday Drivetime. Ĉu nun oni procesos kontraŭ tiujn homojn pro krima neglekto? Aŭ ĉu oni procesos kontraŭ ilin pro trompo aŭ io multe pli malbona?

Lee Hazeldean fine malkaŝis sin kiel film-direktoron Ben Fellows en radio-diskuto kun Lou Collins kaj raportisto de Infowars Patrick Henningsen en la radiostacio Liberty Tactics



(<http://libertytactics.com/2012/07/breaking-olympic-whistleblower/>). Li diris al ni ne nur pli da detaloj de la ĥaoso, sed li ankaŭ klarigis kial li malkaŝis sian veran identecon en tiu stadio, jam dirinte al Tony Gosling, ke li esperis daŭrigi la kaŝan laboron ĝis la komenco de la Olimpiaj Ludoj. Tony Gosling jam demandis al li, ĉu li kontaktis ĵurnaliston Andy Davies de la televida novaĵprogramo Channel 4 News, kaj Lee Hazledean respondis, ke Andy Davies ne volis scii. Estis tiu aserto, kiu rezultis en lia posta eltiriĝo de la operacio.

La parto de la konversacio kiu rilatis al Andy Davies kaj Channel 4 News tekstis jene (ekante ĉe 43:55):

#####

Lou: Lee, mi volas nur ... Mi scias, ke Tony Gosling demandis al vi: "Ĉu vi iris al la tradiciaj amaskomunikiloj rilate al tio?"

Ben: E, jes, mi faris, e, komence, sciu. Unu el la kialoj ke mi, tiel diri, faris tion estis ĉar – mi jam kontaktiĝis kun Channel 4, kio estis Andy Davies, la korespondanto pri enlandaj aferoj, kaj do mi pensis, sciu, li antaŭeniros kun tiu – li prenos ĝin. Mi retleteris al li la 13an de junio. Li retelefonis al mi kaj, esence li diris: Vidu, sciu, ŝajnas esti iaspeca amaskomunikila novaĵ-malpermeso, estas ... Channel 4 ne interesiĝos kaj ne faros ion kiu damaĝos la Olimpiojn. Tio esence estis tio kion li diris al mi, kaj mi reagis: "O!, Bone". Nu, kio vere estas interesa estas, ke – sciu – Tony Gosling – estas vere danke al li, ke tiu ĉi novaĵo entute malkaŝiĝis, ĉar li traktis pri la afero en sia radio-prezento, kaj tiel ni anoncis la novaĵon, kaj ... sed hieraŭ mi ricevis telefonvokon de Andy Davies, kiu, e, vere estis – sciu – li voĉatakis min kaj ŝajnis, ke mi neniam renkontis lin, kaj ke mi neniam parolis al li, kaj ke li neniam diris tiujn aferojn, kaj mi diris al li, "Sed Andy, mi povas tion pruvi". [rido] Sciu, em, kaj esence li akuzis min esti mensoganto, kaj li diris, ke li deziras, ke mi retiru kion mi diris pri lia parolado kun mi, kaj tion mi rifuzis fari, kaj mi tutsimple diris al li: Vidu, sciu, vi ne povas tiel reskribi la historion, mi bedaŭras. Li ĵus sendis al mi retleteron malfrue hieraŭ vespere ŝajnigante, ke li eĉ ne legis mian retleteron. Li eĉ diris, "O, mi ĵus ricevis vian retleteron". Sciu, mi diris, "Tio ne funkcios". [rido] Sciu, mi povas pruvi mian flankon de aferoj; ĉu vi povas pruvi vian flankon de aferoj?", kaj li volis, ke mi diru, ke mi mensogis, kaj li volis diri – evidente G4S premis lin, ĉar mi nomis lin en la intervjuo, em, kaj nun li premas min.

Lou: Do li premas, momenton, li premas vin por diri, ke vi mensogas pri li aŭ ĉu mensogas pri tio kion vi malkaŝadis?

Ben: Ne, ne, mensogante pri li.

Lou: Bone, en ordo.

Ben: Ne ĝenis lin, ke mi malkaŝis pri G4S; estis ĉar li estis enplektita. Kaj mi jam parolis al li, kaj do li deziris, ke mi diru al ĉiuj, esence, "Efektive, sciu, mi mensogis, mi tute ne diris tiujn aferojn al Andy Davies. Mi tute ne iris al li, , bla bla bla bla bla", kaj tio ne estas la vero. [rido] Mi volas diri, ke simple ne estas la vero. Kaj, em, kaj mi diris al li tion ĉi: Mi ne faros, kaj mi sonregistris tiun konversacion, kiel oni povas konstati, li kondukis, ni diru, orgojle kaj arogante kaj false, pro tio ke mi, tiel diri, sonregistris ion, em, kaj do, sciu, estis vere maltrankvilige al mi. Kaj esence li proponis al mi [elirvojon?]. Li alvenis kun: "Vidu, via rakonto pri G4S eble havas meriton". Eble havas meriton, ulo? Ĝi fariĝis tutmonda. [rido]

Lou: Jes, jes.

Ben: Sciu, kaj do, em, kaj li diris, "Vidu, se vi retiros vian aserton mi sidiĝos kun vi kaj parolos al vi pri via rakonto, kaj mi reagis: "Ne, mi ne faros tion, sciu, kaj vere ni havis, sciu, mi volas diri, mi estis plena de adrenalino; tion mi ne atendis. Ĝi venis kiel fulmo el blua ĉielo. Estis malfrue vespere, sciu. Li vokis al mi hejme. Sciu, se mi ne estis parolinta kun li, kiel li povus havi mian numeron? Sed li vokis al mi hejme. Ĉu ne? estas ridinde, ĉu ne, kio okazas.

Lou: Jes. Tute ridinde.

Ben: Kaj do li nun malmaskos min, esence – tion mi opinias okazos – al G4. Li scias kiu mi estas, kaj do, em, li povas diri al G4S: "Vidu, tiu estas la persono, tion ili faras. Sed nun la afero foririst de rakonto pri sekureco al rakonto pri ĵurnalisto, ĉu ne, kiu provas ĉantaĝi kaj regi alian ĵurnaliston por ke li mensogu, kaj tiu ĉi estas la tradiciaj amaskomunikiloj pri kiuj ni parolas. Ni ne parolas pri iu, ĉu ne – mi ne scias kio – tiranoj en la sama strato; ni parolas pri homoj kiuj laboras por Channel 4 News, de la kompanio ITN, kiuj faras tion. Sciu, mi volas diri, ke tio estas ŝoka. Bonŝance mi sonregistris la konversacion hieraŭ vespere, e, ĉar [???] ne sonis bona, do mi sonregistros tion, kaj mi ĝojas nun ke mi faris, ĉar ne eblus al mi, ĉu ne – iuj el la aferoj kiujn li

diris, kaj kiel li diris ilin. Alie mi ne povus pruvi al iu ajn; ili ne kredus min, ĉu ne, estas freneze.

#####

Lou Collins tiam diris, ke ŝi telefonis al la ĵurnalista novaĵ-oficejo de BBC kun la rakonto, kaj oni diris al ŝi, ke la mesaĝo estos transdonita, kaj ke ili aranĝos ke iu telefonu al ŝi. Sed ne estis BBC kiu retelefonis; estis G4S, dirante al ŝi, ke ŝi ne dissendu, kaj ke ŝi ne diskutu pri la intervjuo kun Tony Gosling.

Pli da pruvo de premo por mutigi la ĵurnalistojn pri negativaj rakonto pri la Olimpiaj Ludoj malkaŝiĝis en diskuto inter Lou Collins, Ben Fellows kaj Brian Gerrish, elsendita de la retejo de UKColumn la 5an de julio (<http://www.ukcolumn.org/article/g4s-called-home-office-following-ben-fellows-appearance-uk-column-live>).

Laŭ mia scio tio donas al ni unikan subkomprenon pri la meĥaniko de cenzurado en la brita gazetaro, pri kiu tre konscias la tuton de la vero-movado, kaj pri kiu konsciis George Orwell en 1949, kiam li verkis sian cenzuritajn antaŭparolon por 'Besto-Farmo': "La timiga fakto pri literatura cenzurado en Anglio estas, ke ĝi estas ĉefe volontula. Nepopularaj ideoj povas esti silentigitaj, kaj neoportunaj faktoj tenitaj en la mallumo, sen la bezono de oficiala malpermeso. ... Iu ajn kiu defias la laŭmodan ortodoksecon trovas sin silentigita per mirinda efikeco. Vere nelaŭmoda opinio preskaŭ neniam ricevas justan aŭdadon, ĉu en la populara gazetaro, ĉu en la altkulturaj periodaĵoj" (<http://home.iprimus.com.au/korob/Orwell.html>). Nun evidentiĝas, ke tiu cenzurado ne estas tiom volontula kiel ĝi ŝajnas esti. Mi scivolis en mia junia novaĵletero, ĉu povus esti ia 'D-averto [registara sekurec-averto al ĵurnalistoj] pri Olimpia sekureco; nun ŝajnas, ke la novaĵ-malpermeso estis realigita pere de minac-timigo fare de G4S. Eble ni povus tion nomi 'G-averto'. Ne temas pri desupra cenzurado kiel en evidenta diktatoreco; temas pri desuba cenzurado realigata pere de la premo de investitaj interesoj al individuoj.

Mi opinias, ke estus maljuste elelekti Andy Davies pro kritiko pri tiu ĉi; ĉion konsiderinte, Ben Fellows evidente konsideris Andy Davies kiel tiu kiu plej verŝajne akceptus la novaĵrakonton. Apenaŭ povas esti eĉ unu politika ĵurnalisto en la tradiciaj amaskomunikiloj kiu ne simpatias kun Andy Davies; iu ajn el ili povus esti en simila situacio. Ĉu oni devus submetiĝi

al minac-timigo ne estas la arfero, kaj mi ĉiukaze ne havas sufiĉe da detaloj por scii kiaj estis la premoj; la afero estas, ke homoj ja submetiĝas al minac-timigo. "En tiu ĉi lando intelekta malkuraĝo estas la plej granda malamiko kiun devas alfronti verkisto aŭ ĵurnalisto, kaj tiu fakto ne ŝajnas al mi ricevi la diskuton kiun ĝi meritas", skribis George Orwell en tiu sama antaŭparolo. Certe nun estas bona momento ke politikaj ĵurnalistoj staru firme kontraŭ minac-timigon; ili havas profesion intereson vidataj tiel ke ili diras la veron prefere ol kiel politikaj propagandistoj. Kiam temas pri sekurec-haoso de Olimpiaj proporcioj estas risko je vivoj. Ili devus intervjui Ben Fellows kaj doni al li plenan agnoskon pro tio kion li faris. Tiu afero ne foriros.

Anstataŭe, Ben Fellows kaj aliaj okazigas sian propran eventon por atentigi al la publiko pri tiu afero ([http://alternativeview.co.uk/index.php?route=product/product&product\\_id=159](http://alternativeview.co.uk/index.php?route=product/product&product_id=159)). La evento, 'The Perfect G4Shambles' [La Perfekta G4S-Haoso] okazos en Londono la 25an de julio, kiam Ben Fellows parolos pri 'Malmaskado de la G4S-fiasko ... de INTERNE!', Tony Gosling parolos pri 'Malmaskante la maskado de la tradiciaj amaskomunikiloj', kaj Ian R Crane parolos pri 'Londono 2012 .. Starigita por FIASKI!'. Ilia novaĵletero diras, ke ili "prezentos la pruvajon kiu esence pruvos, ke la G4S-fiasko estas anstauŝtarigita evento por faciligi la militismigon de London al la militservo".

Sed malgraŭ iliaj mankoj, la tradiciaj amaskomunikiloj ja disigas iujn el la informoj pri la korporacia transpreno de la Olimpiaj Ludoj. 'Britio inundita de "markonoma polico" por protekti sponsorojn' tekstis unu ĉeflinio en The Independent la 16an de julio (<http://www.independent.co.uk/news/uk/home-news/britain-flooded-with-brand-police-to-protect-sponsors-7945436.html>).

"Centoj da enuniformaj Olimpiaj oficistoj komencos traveturi la landon hodiaŭ por efektivigi la multmilionpundajn merkatajn aranĝojn de Olimpiaj sponsoroj, en detale organizita misio, kiu kontrastas kun la lukto por trovi sufiĉe da stabanoj por sekurigi la Olimpiajn ejojn ... Sub leĝaĵo speciale enkondukita por la Londonaj Olimpiaj Ludoj ili havas la rajton eniri butikojn kaj oficejojn kaj realigi kortumajn intervenojn kun monpuno de ĝis £20 000. ... Olimpiaj organizantoj avertis entreprenojn, ke dum 'Londono 2012; ilia reklamado ne inkluzivu liston da malpermesataj vortoj, kiu inkluzivas 'gold' [oro], 'silver' [arĝento] kaj 'bronze' [bronz], 'summer' [somero], 'sponsors' [sponsoroj] kaj 'London'", ili skribis. Mi aldonis komenton: "Baldaŭ ili enkarcerigos Max Keiser pro lia deziro reiri al la ora monbazo". Tiu ĉi estas korporacia transpreno, en kiu korporacioj

povas cenzuri la gazetaron, efektiviĝi novaĵn leĝojn, deploji policianojn por efektiviĝi ĝin, kaj eĉ profiti el impostaj exceptigoj, tiel ke la publiko neniel finance profitas el ilia entrepreno (<http://www.ethicalconsumer.org/commentanalysis/corporatewatch/thegreatolympictaxswindle.aspx>). Mi ĵus subskribis petskribon postunante ke la Olimpiaj korporaciaj sponsoroj pagu sian justan parton de la impostoj (<https://secure.38degrees.org.uk/Olympic-Tax-Dodging>), kaj pluan en la sama retejo por malpermesi sekretan lobiadon (<https://secure.38degrees.org.uk/stop-secret-lobbying>). Oni sentu sin libera subteni.

Ŝajnas, ke la polico ne plu estas en sia loko por protekti la publikon, sed, ke ĝia rolo estas, kiel oni diris al Tony Farrell, simple kiel "piedsoldatoj de la registaro". La verdikto, ĵus anoncita, de 'senkulpa' en la proceso kontraŭ policano Simon Harwood, kies feroca atako al apudstaranto Ian Tomlinson dum la manifestacio de G20 estis vidata de milionoj, estis priskribita de familia porparolanto kiel 'ŝerco' (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2175957>). Mi certas, ke la familio havas vastan simpatian inter la publiko, kaj ke estos kreskanta maltrankvilo pri la rolo de la kortumoj. La 18an de julio estis anoncita la verdikto rilate al la zombioj arestitaj dum la reĝfamilia geedziĝo, pri kiu mi raportis en mia novaĵletero de aprilo-majo. La verdikto estis, ke la polico agis laŭleĝe. La kampanjantoj avertas: "... tiu ĉi rezulto povus esti interpretita tiel ke ĝi donas al la polico liberan manon en plenumo de pli da antaŭtempaj arestoj de 'konataj aktivistoj' dum la Olimpiaj Ludoj" (<http://pageantryandprecrime.wordpress.com>).

Nia Londona kolego Mark Windows antaŭ nelonge raportis, kiel policano provis logi lin en kaptilon, plantante tranĉilon en subtero vagono (<http://www.landofthefree.co.uk/site/component/article/1-latest-news/134-british-police-plant-knife-in-tube-carriage>).

Vero-kampanjantoj devas nun esti tre zorgaj. La plimulto de la vero-kampanjantoj kiujn mi konas diras, ke ili restos tute for de Londono, sed tio povas esti iomete malfacila por tiuj kiuj loĝas tie.

Ŝajnas, ke BBC planas pluajn misinformojn pri 'konspir-teorioj'. Londona korespondanto de Infowars Paul Watson estis invitita partopreni en dokumenta filmo pri konspir-teorioj de 9-11 ĝis la Olimpioj (<http://www.thetruthseeker.co.uk/?p=51588>). Ĉu li faru, li demandas. En aprilo mi ricevis inviton partopreni en nova dokumenta programo de BBC pri 7-7 por esprimi miajn "kredojn". "Ĉu mi faru?", mi demandis al miaj kolegoj en la grupo '9/11 Keep Talking'. Ni ĉiuj konsentis ignori ĝin.

Mi menciis en mia novaĵletero de aprilo-majo novan libron pri Operacio Gladio, titolita 'Gladio: NATO's Dagger At The Heart Of Europe' [Gladio: Ponardo de NATO ĉe la koro de Eŭropo] de Richard Cottrell. Mi kontaktiĝis kun Richard Cottrell, iama ĵurnalisto kaj Eŭropa Parlamentano por Bristol, kaj la 16an de julio li provizis por tiu ĉi novaĵletero la sekvan analizon:

"La ĉi-matena aro da rakontoj pri la Granda Olimpia Fuŝo estas – surface vidataj – plua ekzemplo de la legenda brita nekompetenteco en la pritrakto de grandskalaj eventoj. Estas elemento de tio, kompreneble, sed ŝajnas al mi, ke kion ni vere vidas estas deca kvanto da de zorga kaj intenca malkompetenteco.

"Mallonge dirite, malstrikta sekureco, nesufiĉaj nombroj de trejnitaj stabanoj, last-momenta konstato de la preskaŭ kompleta kolapso de streboj fare de privata sekurec-kompanio provizi personaro por la Olimpioj, estas malpli produkto de organika ĥaoso ol projektitaj preparoj pro iaspeca fals-flaga incidento.

"Ke Theresa May ne estas taŭga por ajna grava politika rolo estas tute evidente; sed evidente tio kvalifikas tiun senĝojan ministron por sinteza ĥaoso kiel la perfekta individuo en la ĝusta loko en la ĝusta momento.

"Se io ja misiros, tiukaze la registaro havas alibion jam fabrikitan laŭ la mendo: ni faris ĉion eblan, ni enigis la armeon, ni enigis la artilarion, ni eĉ skrapis la fuindon de la rivero Tamizo per unu en niaj malmultaj restantaj militŝipoj. Ni fidis en privata sekurec-firmao ĝustatempe liveri, kion ili ne faris, sed ĉar ili malsukcesis enordigi aferojn tute ĝis la lasta momento ni devis aŭ nuligi la Olimpiojn kaj trompi la esperojn de milionoj, aŭ antaŭenpuŝi la aferon kun la fido, ke ekstra trejnita personaro de la polico kaj la militservoj sufiĉos.

"Jes, tio sonas sufiĉe nekonvinka, sed en la malbonŝancaj cirkonstancoj de iaspeca atako (kiu ne nepre estu ruiniga, pli grave estu granda ĉeflini-generilo) la plej forta defendo kuŝos en parolo pri 'atako de nia vivmaniero, niaj plezuroj kaj liberoj', kaj simile. 'Neniu eĉ en perfektaj cirkonstancoj povus garantii, ke la bombisto ne sukcesos penetri'.

"Ŝajnas al mi, ke tiu povus esti la vera skripto malantaŭ la prepara ago kiu nun sternaĝas sur ĉiuj amaskomunikiloj."

Dankon pro tiu verkaĵo, Richard. Mi kontentus se ili tutsimple nuligus la

Olimpiajn Ludojn. La Olimpia idealo estas morta. Kiel ĉiuj bonaj ideoj ĝi estis transprenita de investitaj interesoj kaj ŝanĝita al io kion oni neniam intencis, ke ĝi estu. La kompanio G4S mem fariĝas nun ĉefa sekurec-reisko, ĉar se iu ajn intencas eksplodigi bombojn dum la Olimpiaj Ludoj ili certe jam enfiltris G4S kaj tute eble jam dismetis siajn eksplodaĵojn. La Olimpia kontrakto kun G4S devus esti tuj nuligita, kio ajn estas la kosto. Nick Kollerstrom, aŭtoro de 'Terror on the Tube' [Teroro en la Subtero] skribis, "Se vi havas bileton por la Olimpioj, senigu vin de ĝi! Tutsimple restu for" (<http://terroronthetube.co.uk/2012/06/27/israeli-terror-threat-to-london-olympics>).

Se estos teror-incidento lige kun la Olimpioj, estas verŝajne, ke la instancoj tre rapide dismetos en la mensojn de la publiko la ideon, ke ĝi "surhavas ĉiujn sporojn de Alkaido", aŭ, kiel esprimis ĝin Tony Blair post la Londona bombado de la 7a de julio 2005, "Ni scias, ke tiuj homoj agas en la nomo de Islamo" (<http://www.guardian.co.uk/politics/2005/jul/08/uk.g82>). Mallonge post kiam mi skribis la supran frazon mi aŭdis en la novaĵoj pri aŭtobuso da israelaj turistoj kiujn estis disbombitaj de sinmortiga bombisto en Bulgario. Laŭ unu atestanto tion kaŭzis sinmortiga bombisto en la aŭtobuso, kaj laŭ alia atestanto la eksplodo estis en la valizejo sub la aŭtobuso. Tamen du horojn pli poste Israelo kulpigis Iranon. Ĉu tio ne sonas ĝuste kiel 7-7?

La konstanta ripetado de la mantro signifas, ke la plimulto de la homoj ekkredos ĝin, kiajn ajn kontraŭajn pruvojn oni poste trovos. Tamen se estos incidento ĉe la Olimpiaj Ludoj, la probable ke tiaj asertoj estos veraj devas esti ege malalta por iu ajn kiu jam studis antaŭajn teror-eventojn, kiel la Ĉefa Analizisto de strategiaj infromoj ĉe la Sud-Jorkŝira Polico, Tony Farrell, antaŭ ol li estis maldungita, kiel mi jam raportis en tiuj ĉi novaĵletoj. La ideo, ke niaj propraj instancoj povus esti partoprenantoj en amasa murdo estas ankoraŭ nekredbla al la plimulto de la homoj, tamen ekzistas superŝuta pruvo por subteni ĝuste tion.

La kazo de Operacio Gladio estas bone dokumentita kaj devus esti multe pli bone konata. Usona filmoproduktisto Allan Francovich produktis tri-partan dokumentan filmon, 'NATO's Secret Armies' [La sekretaj armeoj de NATO] en kiu li intervjuis kernajn rolantojn en Gladio, kiel la ĉefo de Propaganda Due, Licio Gelli, itala nov-faŝisto kaj teroristo Vincenzo Vinciguerra, Venecia juĝisto Felice Casson, Itala komandanto de Gladio generalo Gerardo Serravalle, belga senatoro belga Roger Lallemand, Belga ĝendarmo Martial

Lekue kaj antaŭa CIA-direktoro William Colby. Tiu estis tele-elsendita en Britio per BBC 2 en junio 1992. La epizodoj estis: 1: Gladio: The Ring Masters [Gladio: La ringestroj] (1992-06-10); 2: Gladio: The Puppeteers [Gladio: La marionetistoj] (1992-06-10); 3: Gladio: The Footsoldiers [Gladio: La piedsoldatoj] (1992-06-24). Kvin jarojn pli poste Allan Francovich mortis dum li trairis usonan doganon en Texas ([http://findarticles.com/p/articles/mi\\_qn4158/is\\_19970428/ai\\_n14114276](http://findarticles.com/p/articles/mi_qn4158/is_19970428/ai_n14114276)). La dokumenta filmo nun spekteblas rete ([http://motionempire.com/Watch\\_Gladio\\_Documentary\\_Online\\_for\\_Free\\_37954.html](http://motionempire.com/Watch_Gladio_Documentary_Online_for_Free_37954.html) or <http://archive.org/details/operationgladio>).

La unuan erudician studon pri Operacio Gladio produktis svisa historiisto Daniele Ganser en sia libro 'NATO's Secret Armies. Operation Gladio and Terrorism in Western Europe' [Sekretaj armeoj de NATO. Operacio Gladio kaj terorismo en Okcidenta Eŭropo]. Tiu estis eldonita la 22an de decembro 2004, do estus vendata dum la ses monatoj ĝis 7-7. La mondo devus esti avertita; devas esti, ke multaj erudiciuloj, politikistoj kaj ĵurnalistoj konsciis pri tio, tamen neniu publike levis la demandon, ĉu 7-7 povus esti parto de Operacio Gladio aŭ ia simila agado de la fortoj de NATO. La libro poste aperis en naŭ pluaj lingvoj (<http://danieleganser.ch/Buecher.html>).

Nun, kiel mi raportis en mia novaĵletero de aprilo-majo, antaŭa brita televid-ĵurnalista kaj Eŭropa Parlamentano Richard Cottrell ĵus aŭtoris libron 'GLADIO NATO's Dagger at the heart of Europe: The Pentagon-Nazi-Mafia terror axis' [GLADIO – la ponardo de NATO ĉe la koro de Eŭropo: La teror-akso Pentagona-Nazia-Mafia], eldonita de Progressive Press en majo 2012 (<http://www.amazon.co.uk/Gladio-NATOs-Dagger-Heart-Europe/dp/1615776877>). Do venontfoje kiam estos teror-evento, ĉu estos levitaj demandoj pri Gladio? Nu, unu ĵus okazis en Bulgario, kaj ne, tute nenio estas dirata pri Gladio.

Ŝajnas al mi, ke por kontraŭagi la mantron 'Kulpas la islamanoj', ni bezonas nian propran mantron. Mi opinias, ke necesas vaste dismeti la nomon 'Gladio'. Nun ne gravas pri la klarigoj, ĉar estas jam en la reto multaj klarigoj, sed gravas la nombron de okazoj en kiu la vorto 'Gladio' ripetiĝos, eĉ se komence malmultaj scias kio ĝi estas. La misio devus esti dismeti ĝin en blogoj kaj komentoj al blogoj en novaĵ-retejoj. Se ili asertas, ke la incidento surhavas ĉiujn spurojn de 'Al Qaida' [Alkaido], tiukaze eble ni devus reliterumi la nomon kiel 'Al CIA-da' [AICIA-do]. Ĉion konsiderinte, Alkaido ĉiam estis usona datumbazo da CIA-operaciantoj kaj iliaj kunbatalantoj. Kio ŝanĝiĝis? Kernaj verokampanjantoj eble trovos, ke



iliaj komputiloj ne funkcias; tiu ĉi devas esti aktiveco de ordinaruloj.

Mi opinias, ke vero-kampanjantoj ĝenerale konsentus kun la takso de MI5, ke la risko estas serioza. Se okazos nenio ni ja eble estos nomitaj 'paranojaj', sed kion diri? – ni ĉiuj nun estas paranojaj. La 12an de julio raportis Sky News: "Dungito por sekurec-firmao G4S diris al Sky News, ke li opinias, ke estas ŝanco de 50% ke iu povus enporti bombon en la Olimpiajn ejojn"

(<http://news.sky.com/story/960218/why-didn't-the-security-alarm-ring-over-g4s> – alklaku la tuj-aperan raporton 'Warnings Over Olympic Security'). La malmaskanto, nenomita dungito de G4S jam

La 17an de junio ne okazigis kunvenon de nia grupo '9/11 Keep Talking', kiun organizas Nick Kollerstrom kaj mi en Londono, por diskuti la eblecon de fals-flaga atako dum la Olimpiaj Ludoj. Nel Glynn parolis pri sia propra analizo, kiun li jam vaste distribuis retroŝte. Lia analizo baziĝis sur artikolo 'How to Stop a False Flag Terror Attack' [Kiel ĉesigi fals-flagan teror-atakon] de David Chase Taylor, kiu listigis ses signojn ke verŝajne okazos fals-flaga teror-evento

(<http://truthernews.wordpress.com/2012/06/29/how-to-stop-a-false-flag-terror-attack/>).

Tiujn li klarigas sub jenaj subtitoloj: 1. Novaĵoj kaj Propagando, 2. Oficialaj raportoj kaj dokumentoj, 3. Internaj memorandoj, 4. Komplotoj kaj Uzatoj, 5. Privataj sekurec-firmaoj, 6. Antaŭprovoj, milit-ludoj kaj milit-ekzercoj. Noel Glynn konkludis, ke kvin el la ses el tiuj spuroj jam estas plenumitaj. "Mia konkludo el ĉio supre estas, ke estas abundo da averto-signoj, ke povus esti planata fals-flaga atako por la Olimpiaj Ludoj ĝuste en tiu ĉi momento dum la okuloj de la mondo fokusiĝas sur Londono. Tio sufiĉas por kaŭzi seriozan maltrankvilon, sed ne sufiĉe por senti certecon, ke tio okazas. Alternative, atako povus esti revokita pro la fakto, ke tio eble gajnas tro da publikeco", li skribis. David Chase Taylor ankaŭ atentigas pri la signoj kiujn oni serĉu post tia atako: 7. Teror-skripto. 8. Konfliktaj raportoj, 9. Suspektato identigita ene de 24 horoj, kaj 10. 'Cui bono?' – kiu profitas.

Ni konsideru kiam kaj kie povus okazi tia evento, se ĝi okazos. La maltrankvilo de Nick Kollerstrom temas pri la kvanto de radioaktiva rubo sub la Olimpia Stadiumo, kaj pri la eĉentualaj efikoj de tio estus se eksplodo skuus la fundamentojn

(<http://terroronthetube.co.uk/2012/06/27/israeli-terror-threat-to-london-olympics>).

Tio eble sugestus incidenton en la Olimpia stadiumo mem iam ajn dum la ludoj, laŭ priskribo en scenaro en la televidserio de BBC 'Spooks Code 9' [Fantomoj (=Spionoj) Kodo 9], en kiu estas nuklea atako en la malferma

ceremonio ([http://en.wikipedia.org/wiki/Spooks:\\_Code\\_9](http://en.wikipedia.org/wiki/Spooks:_Code_9)). Ĝuste kiam mi estis forlasante la kunvenon iu atentigis, ke la fina tago de la 'Paralimpiko' (por handikapitoj) estos la 11a de septembro. Jen io pri kiu cerbumi.

Mia propra analizo baziĝis sur la scenar-analizo de la Fondaĵo Rockefeller, pri kiu mi raportis en mia junia novaĵletero, kaj kiun pri esplora ĵurnalista Adrian Salbuch opiniis povus esti intencita kiel averto al la membroj de la interna rondo de la Establaĵo pri planata fals-flaga atako. En unu scenaro ili parolis pri bombo kiu mortigis 13 000 homojn ĉe la Londonaj Olimpiaj Ludoj. If Adrian Salbuch pravas pri tio, ili tiukaze devus specifi en sia enkodigita mesaĝo tri aferojn: kio, kie kaj kiam. La 'kio' kaj la 'kie' estas evidentaj, sed la 'kiam' estas malpreciza; tio devus esti pli bone specifita ol la periodo de la Olimpiaj Ludoj, ĉar foresto de la rondanoj de la Establaĵo dum la tuto de la Olimpiaj Ludoj estus elstare evidenta. Ni devas do serĉi tagon. Mi skribis en mia junia novaĵletero: "Mi scivolas, ĉu, kiam oni tradukas, ili povus voli diri: 'la Olimpia bombadon de 2012, kiu mortigis la 13an de aŭgusto 1000'. La dek tria de aŭgusto estas la tago en kiu la homamasoj disiĝos de la Olimpioj". La scenaro povus jam esti starigita, ekzemple en la nova Olimpia terminalo de la flughaveno Heathrow. Ŝajnas, ke oni preparas nin por evento. 'Novaj sekurec-timoj dum kontroloj ĉe Heathrow maltrafas teror-suspektatojn' raportas The Guardian (<http://www.guardian.co.uk/uk/2012/jul/14/heathrow-checks-miss-terror-suspects>). '400 soldatoj patrolas Heathrow inter teror-timoj' raportas Daily Mail, dirante, ke 450 trupoj kun armitaj aŭtomobiloj enlokiĝis pro la fino de la islama festivalo de Eid (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-160010/400-soldiers-patrol-Heathrow-amid-terror-fears.html>). Tiam Sky News raportis: 'Usonaj sekurec-agentoj "ĉe Heathrow por Olimpioj"' (<http://news.sky.com/story/961071/us-security-agents-at-heathrow-for-olympics>). Mi postlasis komenton pri la raporto de Daily Mail pri tio: "Eksterlandaj trupoj en sekurec-operacioj en brita flughaveno estas mem eventuala rompo de nacia sekureco. Brita nacia sekureco devus esti traktata de britoj laborantaj por la brita publiko. Tio estas vere vere danĝera" (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2174634/American-officers-drafted-Heathrow-British-airports-help-security-Olympics.html>).

Aliflanke, mi nun konstatas, ke la regiono de la Olimpia Stadiumo nomiĝas 'Hackney and Lee Valley', en Londono E10. 'Hacken Lee' (= 'Hack kaj Lee') estas la nomo de ĉina kantisto kiu 'gastigis' la Olimpiajn Ludojn en

Beijing, kiel vortumas la anglalingva Wikipedia. Reklamo kiu aperis en ĉina televido por la futbalĉampioneco 'Euro 2012' temas pri atleto kun 'Hacken Lee 10' sur sia T-ĉemizo

(<http://thedogstar.com/articles/the-2012-london-olympics/> – ĝi fulme aperas 9 sekundojn de la komenco). Tiu estas agresiva reklamo kiu bildigas la detruon de Londono. Nun rigardu videon de la brita kontribuo al la ferma ceremonio ĉe la Olimpiaj Ludoj de 2008 en Beijing ([http://www.disclose.tv/action/viewvideo/61906/London\\_2012\\_7\\_7\\_Olympics\\_Sacrifice\\_Ritual/](http://www.disclose.tv/action/viewvideo/61906/London_2012_7_7_Olympics_Sacrifice_Ritual/)).

La scenaro de la Fondaĵo Rockefeller, en kiu mortas 13 000 homoj nomiĝas 'Hack Attack'. Ĉu povus havi sencon, ke estu atako la 13an de aŭgusto en Hackney and Lee Valley, poŝtokodero E10?

En nia kunveno de 'Keep Talking' unu persono, Kevin O'Connor opiniis, ke troigo de la terorista minaco eble povus esti nur blufado, kaj ke eventuala atako eble venus post la Olimpiaj Ludoj (<http://kevinclarion.wordpress.com>). Mi antaŭe opiniis, ke ili kapablu tiamaniere instigi la deziran nivelon de timo, por militeca subpremo, sed nun vidinte la skeptikon de la publiko rilate al tio kion diras al ili politikistoj post la plej lasta fiasko pri G4S, mi nun havas kelkajn dubojn pri tio. Estis iom da diskuto, kiom granda povus esti tia evento. Mi suspektas, kiel Richard Cottrell, ke malgranda evento povus kaŭzi grandegan kvanton da ĥaoso, speciale se ĝi disrompos la transport-sistemon. Ĉion konsiderinte, ne necesas iaj Olimpiaj Ludoj por kaŭzi la ĥaoston de la pasintjaraj aŭgustaj tumultoj. Do kio kaŭzis ilin? Ĝuste dum mi provas finpretigi mian novaĵleteron mi aŭdas pri plua ekzemplo de cenzurado fare de la Establaĵo en Britio. BBC intencis dissendi du-partan televidan dokumentan dramon bazitan sur la tumultoj de la 16a kaj la 18a de julio, kiam ili ricevis kortuman ordonon kiu diris: "Estas ordonite, ke la BBC-programero 'The Riots: In their Own Words' [La tumultoj: En iliaj propraj vortoj] intencita de BBC 2 por tele-elsendo ĉi-vespere ne estu elsendita per iu ajn amaskomunikilo ĝis plua ordono". Plua parto de tiu decido diras: "Plue, la video-kliŝo nun havebla por spektado en la retejo de BBC estu tuj forigita". BBC diris al The Guardian, ke pro juraj kialoj ĝi ne povis malkaŝi detalojn de la kortumo. La filmo estis bazita sur esploroj fare de The Guardian kaj The London School of Economics [La Londona Kolegio de Ekonomiko], kaj iuj el iliaj datumoj estas publikigitaj en la retejo de The Guardian (<http://www.guardian.co.uk/uk/2011/sep/05/reading-riots-study-guardian-lse>). Eble la suspektoj de multaj verokampanjantoj estus subtenataj.

Kio ajn okazos aŭ ne okazos ĉe la Olimpiaj Ludoj, la evento tre verŝajne

provizos grandegan forlogon de la atento. Mi vidas, ke The Sunday Times de 22a de julio amplekse raportas pri antaŭtempa aserto de Israelo, ke Irano eble efektivigos ripeton de la Munkena masakro de 1972, sed mi ne povis trovi mencion en la surpapera eldono pri la lastatempa skandalo en Germanio rilate al la ekstrem-dekstra enplektiĝo en la Munkena masakro, kun scio de la germana sekurec-servo. Mi jam povas imagi verki estontan novaĵleteron kun vortumo simila al: "Dum la atento de la mondo estis forlogita de la granda Olimpia Flanko-Prezento, Sirio / Irano estis invadita de trupoj de NATO / Israelo".

Richard Cottrell faris al mi tre interesan sugeston pri tio kio povus okazi post la Olimpiaj Ludoj: "Kial Blair elektis ĝuste tiun ĉi oportunisman fenestron por deklari, ke li ŝatus denove esti ĉefministro", li demandas, "Ĉu li volas diri ĉefministro aŭ io iomete pli longdaŭra? Ĉu ni diru, neelektiva kiel sugesteton? Ĉu la momento kaj la homo finfine kuniĝis?". Jes ja, kio ajn okazos aŭ ne okazos dum la Olimpiaj Ludoj ni povus finfine havi faŝistan diktatorecon – aŭ korporacian ŝtaton, por uzi la nuntempan politike korektan lingvaĵon – en Britio; Tony Blair neniam plu povus esti libere elektita iam ajn denove. En siaj memoraĵoj Tony Blair priskribis la Akton de Libero de Informoj kiel unu el siaj plej grandaj eraroj dum li oficis. Ĝi ja estis. Se vi volas esti tirano vi ne faru tiajn aferojn. La Informa Komisiono antaŭ nelonge asertis, ke sekretaj dokumentoj estis detruataj, kaj ke oficiuloj en Whitehall uzadis privatajn retpoŝtajn adresojn por eviti ekzemenon. Sed iuj informoj ja eliras. La 26an de julio The Daily Telegraph anoncis 'La NEFO-dosieroj: Tony Blair informiĝis pri ekstertera defendo-politiko' (<http://www.telegraph.co.uk/news/newstopics/howaboutthat/ufo/9392511/The-UFO-Files-Tony-Blair-briefed-on-alien-defence-policy.html>). Eble tio pretigas la tim-rakonton por pravigi raket-lanĉilojn sur la tegmentoj de loĝejoj apud la Olimpia sportejo.

Ankaŭ en Germanio estis detruataj sekretaj dokumentoj. Richard Cottrell kontribuis komenton en la retejo 'End the Lie' [Ĉesigu la Mensogon] pri la lastatempa demisio de la ĉefspiono Heinz Fromm, sekve de la detruo fare de registaraj agentoj de dosieroj pri ekstrem-dekstra terorista ĉelo malantaŭ la murdaj atakoj al enmigrintoj (<http://www.independent.co.uk/news/world/europe/german-spy-chief-heinz-fromm-quits-over-neonazi-investigation-scandal-7904493.html>). La analizo de Richard, titolita 'Germana Gladio restaŭrita: Nov-Nazia murdo-skandalo englutas la registaron de Merkel' (<http://endthelie.com/2012/07/10/german-gladio-redux-neo-nazi-murder-scandal-engulfs-merkels-government>)

tion priskribas kiel "stranga kazo kiu ankoraŭfoje indikas al la sekurec-agentejoj kiuj kirlas sintezan perforton por politikaj celoj". Tio sekvas malkaŝon rilate al la enplektiĝo de nov-Nazioj en la Olimpika Masakro de Munkeno en 1972, pri kiu mi raportis en mia junia novaĵletero. Kiam la homoj komencos demisii pro la detruo de sekretaj dokumentoj en Britio?

Tiranoj amas fals-flagajn atakojn, en kiuj ili kreas maltrankvilon kaj tiam kulpigas siajn kontraŭulojn. la kompreno de Operacio Gladio estas kerna al kompreno de tio kio okazas en la nuntempa brita politiko, kaj enlande kaj eksterlande. Subite aferoj ekhavas sencon. La situacio en Sirio havas sencon, kaj oni memoru, ke CIA estis malantaŭ la supervenko de la registaro de Mossadeq en Irano, kaj la leviĝo al la potenco de Saddam Hussain en Irako. Ĉu tiuj afablaj homoj en potencaj pozicioj en Britio kapablas kulpi pri tiaj ŝokaĵoj kaj torturo kaj murdo? Nu, ni rigardu la kazon de kvar maljunaj kenjanoj, el kiuj unu nun estas morta, kiuj provis gajni justecon sekve de la ribeloj en Kenjo de la 1950aj jaroj (<http://www.independent.co.uk/news/world/africa/in-a-british-court-after-60-years--the-elderly-kenyans-asking-for-justice-at-last-7946671.html>).

La defendo estas la kutima hipokrita mantro 'Tio estas historio'. Nova video, kiu montras kiel aferoj povas aspekti tre malsame se oni surhavas la ĝustajn okulvitrojn, estas produktita de iuj el niaj homoj en 'Keep Talking'. Ĝi nomiĝas 'Kollerstrom and Farrell are dead' [Kollerstrom kaj Farrell estas mortaj]. Ĝi jam nun aperis en multaj retejoj, kiel ekzemple en tiu de la 'Kent Freedom Movement' [Libero-Movado de Kent] (<http://kentfreedommovement.ning.com/video/7-7-kollerstrom-and-farrel-are-dead>).

La tuja celo estas por savi vivojn, sed bona generalo ĉiam antaŭenrigardos al la sekva batalo. Hillary Clinton diras, ke ili perdas la inform-militon; ni devas gajni ĝin. Memoru daŭrigi la paroladon, kaj ne forgesu la vortojn 'Gladio' kaj 'Al-CIA-do' [Al CIAda].

Salutas Ian  
ian@fantom.org.uk

Berkshire 9/11 Truth

<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)  
<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

Estimtaj,

Pri la olimpiadaj ludoj baldau okazontaj en Lodonon, kiel unuelo mi shatas scivolemi: Kio estas pri sporto?

(1) Prauloj saghe rekomended sporton al la homa komunumo kiel simbola saniga ekzerco por la korpo kaj la menso. Platono ech teoriis, ke bokso povas plenumighi eble kiel anstataujho de la militema instinkto che la homo. Tamen, ghuste same kiel mono, kiun oni unuafoje inventis por esti utila rimedo por intershanghi varojn kaj servojn, tiel ankaŭ sporto jam farighas kvazau varo che nia komercisma, naciisma kaj individualisma kulturo. Tuta nacio nuntempe shajne ne povas sinreteni plori au ghoji pro 'perdo' au 'gajno' de siaj championoj okaze de sport-eventoj.

(2) Okaze de la lastaj Olimpioj en Ateno, lau mia memoro, oni ekzemple rimarkis la abundajn larmojn de la marokana kur-atleto Hisham pro ties ora medalo. Aliflanke oni vidis kiel la 'fiasko' de brita Paula plenumi sian personan ambicion akiri or-medalon igis shin aspekti mizera, kiam shi ne plu povis daŭri la marathodon jhus mallonga distanco antaŭ la fino. Lau amas-komunikiloj shi trompis la esperon de la nacio. Tamen davas esti, ke milionoj da homoj tra la mondo dum preskau du horoj ghuadis la vidajhon de Paula kune kun kunkursaninoj elegente kuradintaj tra la Marathonaj vojstrekoj. Vershajne, tio signifis nenion al shi, nek al ni la spektantoj, sen la ora medalo pri kiu shi -kaj ni shiaj geamikoj kaj samnacionoj - revis kaj atendis de shi.

(3) Ankaŭ, rigardi dorsen fare de kelkaj kunkursintoj por certigi, ke oni restu antaŭen certe ne kongruas kun la spirito de Matharono - kunkursado por komuna afero, kio estis ties origina nobla celo savi la grekan ubon kontraŭ la persa minancinta invado.

(4) La vidajhoj de altaj ghojo kaj aflikto de atletoj fakte estas plejparte stimulado de la mito, kiun ni kreas pri ili kiel gloritaj ikonoj de individualeco. Senrigarde al tio, mi kiel unuelo pensas, ke chiu atletaj grupoj kaj individuoj estas meritaj championoj. Devas esti, ke chiu el ili multe planis kaj peni por aliri al la areno de kunkursejo. Kia estas tiu centono de sekondo, tia pravigas or-medalon por la unu kaj areghentan por alia, kio tiam estis la premioj de du samkapablaj kunkursintoj?!

(5) Oni pliprave atendu de atletoj montri al ni nepre la belecon de sporto senrigarde al niaj apartaj nacia au personaj rilatoj kun ili. Sporto ankaŭ estas inda stimuli nin praktiki ekzercadon en nia chiu taga vivo por subteni nian bonfarton - ne nepre adori atletojn kvazau duon-dioj.

Husejn

pri de la okazonta olimpiado en Londono,

Saluton el Sofio! Kiel Prezidanto de La Internacia Esperanto Kursejo, Sofio, antaŭ dek jaroj, Mi sukcesis ricevi Unue de la Distrikto kaj poste de la Ministro por edukado kaj kulturo - Specialan leteron por instigi la instruadon de Esperanto. Sed...

La 06 kaj 07 de Septembro Ni organizas proteston kontraŭ direktoroj kaj rektoroj de diversaj lernejoj, kiuj malhelpas instruadon de Esperanto en iliajn mez- kaj altlernejojn. Alighu ankaŭ Vi, au' informu Viajn geamikojn!

Ni planas fari grupon kaj per similaj reklamoj trairi de la Nacia palaco de Kulturo ĝis la Ministerio de la klerigo kaj kulturo por estigi la lernadon de la Esperanto en lernejoj kaj universitatoj. Ni subtenas la akceptadon de Esperanto kiel laborlingvo en EU. Nia lasta punkto estos je la Placo "Aleksander Nevski". Chiu partoprenanto povos /post antaŭa anonco en la listo de la prelegintoj/ por 2 - 5 minutojn prezenti sian opinion por la propono. Ni provus inviti ankaŭ neesperantistojn el diversaj partioj, eĉ se eblas Ewrodeputatojn nunajn au' jamajn. Vi kaj Viaj geamikoj povos reale au' virtuale alighi. Informu Nin. Lasto NIKOV  
lasto@mail.bg,

Tel.; +359 2 4177938, Portebloj; +359 899/88 22 61, +359 876/88 22 61

—.

de: Rainer Kurz <rk@rkbc.de>

Bonvole internacie distribuu la algluitan PDF-dokumenton "Konkurso per mallongaj filmoj.pdf". Tiu filmkonkurso estas por filmoj de maksimuma daŭro de kvin minutojn. Ĉiu povas partopreni, de komencanto ĝis absoluta profesiulo. La prezento de la plej bonaj filmoj kaj la transdonado de la premioj (entute 5000 EUR) okazos la 15an de Decembro 2012 en Berlino.

La filmkonkurso estas kontribuo de la Germana Esperanto-Asocio por festi 125 jarojn de Esperanto. Bonvolu helpu nin subteni tion gravan datrevenon:

o Mi petas vin distribui la PDF al cxiu de viaj Esperanto-amikoj. Ju pli multe je pli bone. Bv. petu viajn amikojn redistribui la dokumenton.

o Eble vi ankaux povus arangxi publikado en gazetoj aux interretaj forumoj.

o Mi ankaux sercxas voluntulojn, kiuj tradukas la dokumenton al siaj lingvoj kaj sendas gxin al filmistoj aux filmakademioj en sia lando.

Jam ekzistas germanlingva traduko.

Mi dankas vin por via subteno

Rainer Kurz

Organizanto de la filmkonkurso

---

D-ro Rainer Kurz, eposhte: [rainer.kurz@esperanto.de](mailto:rainer.kurz@esperanto.de) Plettenbergstrato 19, 7 0 1 8 6 Stuttgart /

Germanio m: +49-163-3873785, h: +49-711-645139-00, FAX:-10 Estrarano che: •FAME-fondajho [www.fame-stiftung.de](http://www.fame-stiftung.de) • Germana Esperanto Asocio(GEA) [www.esperanto.de](http://www.esperanto.de) • Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) • Rainer Kurz Fondajho por la subteno de Esperanto

---

--

Konkurso per mallongaj filmoj: Esperanto 125-jara

Germana Esperanto-Asocio okazigas konkurson per mallongaj filmoj kun premioj de entute 5000 EUR. Ĉiu povas partopreni, de komencanto ĝis absoluta profesiulo. La sola kriterio estas via kreiveco.

La prezento de la plej bonaj filmoj kaj la transdonado de la premioj okazos la 15an de decembro en Berlino.

Partoprenkondiĉoj

- Ĉiu filmo estu maksimume 5 minutojn longa.



- La rajto pri la muziko por publika prezento devas esti certigita.
- La personoj en la filmo permesis la uzon por publika prezento.
- La filmfaranto garantias per sia subskribo, ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke nenij rajtoj de aliaj personoj estas lezita.
- Post la konkurso la filmoj estos libere prezentablaj por ĉiuj sub la “Creative-Commons-Licence (CC-BY)” .

Kio gravas?

Montru al ni, kion la lingvo Esperanto signifas al vi, aŭ montru, kiel oni povas entuziasmigi la homojn pri Esperanto. Ne gravas, kiun lingvon vi uzas aŭ kiujn teknikaĵojn. Ne ekzistas limoj ĉe la interpretado.

Kiu povas partopreni?

Ĉiuj! Amatoraj reĝisoroj, filmŝatantoj, amaskomunikilaj agentejoj por medioj, studentoj kaj kreemaj homoj el la tuta mondo.

Kio estas permesata?

Ĉio! De desegnofilmoj al dokumentantaj filmoj ĝis teatraj filmoj, ĉion ni volonte rigardos.

La formato ne havas limojn, de movebla telefono al filmkamero. Ĉiu lingvo de la mondo povas esti uzata.

1

Kiel partopreni?

- Limdato estas la 30a de septembro 2012.
- Ĉiuj filmoj faritaj en 2012 estas akceptataj.
- Necesas sendi la filmon en kutima teknika formato (ekz. mov, mpeg, avi, DVD).
- Bonvolu ne sendi originalojn ĉar ni poste ne povos resendi ilin.
- Partopreno eblas nur per poŝtaĵo al:

Kurzfilmwettbewerb - Germana Esperanto Asocio

Silberburgstraße 82

70176 Stuttgart

Germanio

Premioj

- Plej bona filmo: €2000

- Plej bona ideo: €1000

- Plej bona filmo en Esperanto: €1000

- Premio de la publiko: €1000

Jura traktado de la rezulto ne eblas. Se Germana Esperanto-Asocio ne ricevos sufiĉe multajn filmetojn, ĝi rezervas al si la rajton, elŝuti

ne ĉiun premion.

Ĉu estas pliaj demandoj?

Skribu al [kurzfilmwettbewerb@esperanto.de](mailto:kurzfilmwettbewerb@esperanto.de) aŭ telefonu al Rainer Kurz +49-163-3873785.

Por tradukoj al Esperanto aŭ la germana lingvo Germana Esperanto-Asocio estas je via dispono.

Mallongaj informoj pri Esperanto

Esperanto estis prezentata antaŭ 125 jaroj al la publiko je 1887-07-26 kiel lingvoprojekto.

Ek de tiam tiom multaj homoj lernis ĝin kaj per la uzo pli evoluigis ĝin, ke Esperanto hodiaŭ estas aŭtenta lingvo. Jen la historie unua pruvo, ke lingvoj povas esti kreataj.

La uzeblo de Esperanto estas elprovita en ĉiuj komunikaj situacioj, inkluzive la dulingvan edukon kaj skribe en sciencaj kaj literaturaj verkoj. La Esperanto-aŭtoroj formas propran grupon en la mondvasta unuiĝo de verkistoj de la PEN-kluboj.

La fascinon de Esperanto kaŭzas ĉefe ĝia facila lerneblo, kiu helpas ankaŭ al ne-

Eŭropanoj. Esperanto-parolantoj spertas komunan sennaciecan identecon kiel lingve egalrajtaj mondĉivitanoj. Aparte de naciaj kaj internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj la plej multa komunikado okazas en la Interreto. Google kaj Facebook havas Esperanto-versiojn,

la Esperanto-Vikipedio ampleksas nun proksimume 165.000 artikolojn (la 27a el 285 lingvoj). Pli ol 100.000 homoj registris sin en la Esperanto-instruejo lernu.net.

Rimarkigo: Esperantistoj estas invitataj traduki tiun ĉi dokumenton al aliaj lingvoj. - Salutas Rainer Kurz

2

Informcele

Kore,

Germain Pirlot

SUS 33 de AIS San-Marino, septembro 2012

SUS 33, la 33-a Sanmarineca Universitata Sesio de AIS San-Marino, okazos inter la 3-a kaj la 7-a de septembro 2012 en la pola chefurbo Varsovio (Warszawa)

Laborlingvoj : La Internacia Lingvo, italiano · Deutsch · English · français · polski

Piaj sciigoj / <http://www.ais-sanmarino.org/>

Programo / <http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus33/programo.pdf>

2012/8/16 stalino yuan <stalinoyuan@gmail.com>

Invitilo al 1-a Forumo

pri Disvolvigo de Esperanto en Xi'an de Cxinio

Estimataj gesinjoroj,

Saluton al vi ĉiuj!

Ni okazigos en urbo xi'an la unuan forumon pri disvolvigo de esperanto , por cerebri la cent-dudek-kvinan datrevenon de la naskigo de Esperanto kaj la sepdek-sepan datrevenon de la fondigxo de Xi'an-a Esperanto-Asocio, montri utilecon de Esperanto kaj atingon de esperanta praktikado en internacia komunikado, instruado, komercado, arto ktp, por esplori novan elirejon de esperanta disvolvigo kaj por pli bone servi al niaj lando kaj socio! Mil dankojn al UEA(Universala Esperanto-Asocio), IKEF(Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo), ILEI(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), la China Asocio de interkomuniko kaj intertrakto, kaj la Xi'an Jiaotong Universitato pro la subtenoj!

Nia forumo provizas bonxancojn de akademia interkomunikado al intelektuloj, de internacia perspektivo kaj nova sxanco al komercaj elitoj kaj entreprenistoj, kaj precipe de kultura intersxangxo per Esperanto. Nun, ni sincere invitas vin por viaj gvidado, komunikado kaj gxuado.

一、 Invititoj:

esperantistoj, societoj, universitataj specialistoj, kulturaj famuloj, komercaj elitoj kaj tiel plu.

二、 Tempo:

de la 28-a de septembro ghis la 1-a de oktobro

三、 Loko: Nanyang Hotelo de Xi'an Jiaotong Universitato

四、 Programero:

La 28-a de septembro: Akcepto al partoprenatoj

La 29-a de septembro

Matene

Solena malfermigxo de la forumo kaj saluto-parolado de honoraj gastoj.

Parola temo : La historio kaj perspektivo de esperantaj lecionoj en universitato

Fare de sinjoro Lin Liyuan, la prezidanto de Guangzhou-a Esperanto-Asocio.

Posttagmeze

Parola temo : Espernataj gravecoj en interlingvistiko kaj utileco en fremadlingva instruado.

Fare de sinjoro Zhou Liuxi, la profesoro de Pekina Normala Universitato.

Parola temo: Esperanta praktikado en internacia komerco.

Fare de sinjoro Wang Tianyi, la prezidanto de IKEF(Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) kaj Xi'an-a Esperanto-Asocio.

Vespere

Amuza vespero

La 30-a de septembro

Matene

Parola temo: Esperantaj praktikado kaj disvastigo en budhisma kampo de la mondo.

Fare de majstro Miaohui, la fama esperantisto kaj monhxo.

Parola temo: pera utileco de Esperanto inter latinaj lingvoj kaj China lingvo.

Fare de sinjoro. Aldreno, la esperantisto el Brazilo.

Posttagmeze

Parola temo: praktikado kaj perspektivo de Esperanto en la turisma kampo.

Fare de sinjoro Qi Jian, la sekretario de Hubei-a Esperanto-Asocio

Interparolado de delegitoj

Vespere

Vizitado al la norda Placo de Dajan-pagodo kaj sennokta urbo Datang.

La 1-a de oktobro

Ekskurso en Xi'an

Finiĝo de la forumo je la dekdua.

## 五、Sciu pri kunveno

1. Alighkotizo por konferenco,900 RMB/persono,sen manĝo kaj logho.
2. Bonvolu sendi la aligxilon antaux la 25-a de septembro.
3. antau la 25-a de septembro.

## 六、Kontaktaj homoj kaj metodoj

Telefon-numero: 029-82622952

Respondeculoj kaj mobilaj numeroj: Instruisto Juan 15339221362

Instruisto Zhang 15353647522

Retadresoĵ : stalinoyuan@gmail.com 1633766986@qq.com

Xi'an-a Esperanto-Asocio

La 1-an de aŭgusto

2012/8/21 Aurora Bute <a\_bute@yahoo.com>

[Attachment(s) from Aurora Bute included below]

Estimataj samideanoj,

La estraro de EAR decidis , ke la chijara tutlanda E-renkontiĝo okazu en Rascruci, apud Cluj, komence de oktobro (5-7 okt.).

Ni dedichas la aranghon al la 125-a jubileo de Esperanto.

Okazos simpozio kun la temo "Esperanto kaj edukado", konversacia rondo, EAR kaj ILEI-kunvenoj kaj ekskursoj, ĉar troviĝas multaj vidindajhoj ĉirkau la simpoziejo.

Ni invitas vin chiujn partopreni la renkontighon, bona okazo por revidighi nin, paroli Esperante, simpozii, konversacii kaj ekskursi.

Detaloj:

La arangho komencas vendredon tagmeze kaj dauras gxis dimanco tagmeze. Do, temas pri du noktoj kaj sep mangxoj, chirkau 40 EUR (dependas de la nombro de partoprenantoj).

Estas je nia dispono ankaux la konferencejo.

La apartamentoj estas duxambraj, kun 4 kaj 2 litoj kaj banejo. La pejzagxo estas belega kaj en la proksimeco, en la vilagxo Bontida, estas la kastelo Banfi, kiun ni povus viziti ([http://ro.wikipedia.org/wiki/Castelul\\_B%C3%A1nffy\\_de\\_la\\_Bon%C8%9Bida](http://ro.wikipedia.org/wiki/Castelul_B%C3%A1nffy_de_la_Bon%C8%9Bida)).

Ni povus viziti ankaux la urbon Gherla.

Bonvolu anonci vian partoprenon al Mariana mariana.berariu@gmail.com kaj la prelegon dum la simpozio al mi, a\_bute@yahoo.com.

La provizoran programon vi povas vidi en la aldonajho.

Venu kaj ghuu amikan, esperantistan etoson!

Aurora Bute

— · — · —

Attachment(s) from Aurora Bute

1 of 1 File(s)

 ESPERANTO-SIMPOZIO.doc

Reply to sender | Reply to group | Reply via web post | Start a New Topic

Messages in this topic (1)

RECENT ACTIVITY:

Visit Your Group

~~~~~

Kiam oni havos fortan Albanan Esperanto-Asocion per la kunlaboro de c'iu albanaj esperantistoj?

~~~~~



Tre interese. Mi tuj notis la retadreson. Certe alvenos ankaux miaj kontribuajxoj, dankon, Bardhyl

---

From: Germain Pirlot <gepir.apro@pandora.be>  
To: Germain Pirlot <gepir.apro@pandora.be>  
Sent: Monday, August 6, 2012 5:16 PM  
Subject: Kontribuu kaj farighu korespondanto de Eventeo !

Diskonigu informojn tra la mondo per Esperanto

dank al la pagharo <http://www.eventeo.net/web/>

Kontribuu kaj farighu korespondanto de Eventeo !

Ighu unu el niaj korespondantoj ! Tra viaj legitajhoj estas certe temoj kaj informoj en via regiono au lando, kiuj povos interplu hezitu, kaj sendu al ni viajn proponojn pri freshaj artikoloj.

Artikoloj pri la jam aperantaj temoj de Eventeo estos akceptataj (politiko, socio, sciencoj, kulturo, natura medio, ktp...) se surprizigaj artikoloj ! Vi mem elektu. Ni plezure aldonos ilin al nia retejo.

Kompreneble artikolojn kun rasisma, kalumnia au insulta enhavo ni rifuzos publikigi.

Nura kondicho por partopreni : se vi faras simplan tradukon el artikolo nacilingva, bonvolu citi la fonton de via informo, k

Jen nia retadreso al kiu sendi viajn proponojn : [eventeo.net@gmail.com](mailto:eventeo.net@gmail.com)

Ni senpacience atendas viajn mesaghojn kaj antaudankas vin pro viaj kontribuajhoj kaj efika kunlaboro.

La Eventeo-redaktantaro



New

|

Reply

Reply all

Forw

Por kiuj ni verkas?!

Ali Podrimja1



Ali Podrimja

---

1 Elstara verkisto-poeto el Kosovo forpasinta lastatempe

En urbo de Bavario, hazarde falis en mia mano ĵurnalo de Zagrebo. Trafoliumante ĝxin mi rimarkis tekston de mia amiko, Mirko Kovacx. Plezure mi eklegis.

La dauxrigo estis drameca, plene de terurajxoj. Tion kio diritis de honorinda verkisto, mi tute ne volis ke ĝxi estu vera. Cxar temis pri io monstreca. Ie en Bosnio, en urbo Focxa, logxate cxefe de muslimoj, la vivo jam iris malsupren. La malracio regis la racion.

Mi komprenis la ribelemon de mia amiko, sed mi apenaux povus diveni ke la homo estas transformita en bagatelajxo, ke je la fino de XX jc la interetna malamo farigxis instinkto kaj Euxropo estis transformita en teatro de absurdo.

Laux la honorinda verkisto, iu Vojislavo, serba profesoro de universitato de Sarajevo, lauxlonge de la stratoj de Focxa estis vidite futbal-ludante kun la kapoj de la masakritaj muslimoj. El tiuj viktimoj, eble kelkaj povintus esti ecx siaj studentoj, kiuj tie, cxeborde de pitoreska Milacka kondukis liajn prelegojn pri la belo en la arto.

Vojislavo forgesintis ke li estis universitata profesoro kaj okupigxis fojfoje ankaux per verkado. Li estis transformigxinta en fantomon kaj per grado de militista majoro partoprenis en multaj murdadoj kaj etnaj purigadoj. La ruinigxo de Vukovar, Mostar, Dubrovnik, Sarajevo kaj multaj vilagxoj kaj urboj aliaj malpli konataj atestis konvinke ke ne temis nur pri psiko-etiko de individuo.

Paranojo, de tago al tago, malkovris sian vizagxon malbelan ne nur en bulevardeskaj skribajxoj, sed ankaux en etnoso, ideologio kaj filozofio de popolo alproksimigxanta al katastrofo. Cxekape de tiu malbono, staris verkistoj, duonverkistoj, intelektuloj, kvazauxintelektuloj, dubindaj politikistoj kaj rekonaj krimuloj kiujn sercxadis ankaux la internacia polico.

Per naciismaj programoj kaj fashistoidaj ellaborajxoj plenigxis la bibliotekoj aux kreigxis novaj laux la scenaroj.

Kaj kiun do ne maltrankviligas tio? En la konscienco de la verkisto estis okazinta terura eklipso, ne plu ekzistas la humaneco kaj digneco. Laux la naciismaj kapoj iu "cxIELA popolo" ne povas erari. Oni permesas al ĝxi ecx la krimojn.

Oni deklaris serbaj teroj ene de nokto ecx tiujn lokojn, kie blindulo aux lamulo de sia gento estis iufoje preterpasinta. La kondamn-ekspedicioj hastis forvisxi iun ajn spurajxon el la kultura heredajxo kaj identeco de aliuloj en la perforte okupitaj teroj.

El primitiva filozofio apenaux povus naskigxi io humana, escepte de kreitajxo kicxo, senvalorajxo, malgxojigajxo, kun profunda spirita mizerajxo. Naciismo estas ia kicxo, diradis Danilo Kisx. Naciismo farigxis spirita nutrajxo por mezuloj pliigxantaj cxirkaux la nacia tablo.

Tiuj malmultaj verkistoj, posedantaj intelektulan kuragxon por kontrauxtarigi al tiu kolektiva paranojo, deklaringxis perfiduloj de la naciaj interesoj, la eldonistoj fermis al ili la pordon aux ili estis devigitaj ekziligxi. La kuragxo de Mirko Kovacx rememorigis la sorton de serba poeto kiu, spektante surekrane televizia kio okazadis kun la albanaj infanoj, dum la pacaj demonstracioj, kie la serba polico masakris la junulojn postulantaj tion kion estis postulinte antauxe ankaux siaj gepatroj. La poeto estis plorinte, pro la honto kaj mizereco de sia popolo.

Post kelkaj tagoj, mi trovis poezion de tiu verkisto pri la albanaj infanoj, kiuj falis pro la pafado de dumdumaj kugloj, kiun li estis verkinta tiun malfelicxegan nokton: "Vi povas publikigi gxin. Mi estos dankema dum la tuta vivo se vi helpos min elspruci salivon al la vizagxo de naciismo de mia popolo", eldiris li pertelefone al mi.

Sed la letero estis vojaĝinta duonjare. Tio dirite de poeto estis ia kunfrontigxo al la totalisma regximo. La poezio por la albanaj infanoj, ankaux lia vengxemo apenaux estis ia gestajxo. Li kredis en la valoroj kaj libereco de la homoj. Antaux cxio, li defendis la etikon de la verkisto dum malica tempo kiam la naciisma euforio, metaforo de la malbono, estas ekstazo pli forta ol lia vorto kiel humanisto.

La malvalorigxon spiritan de la verkisto, kiu penigis ne nur Mirko Kovacxon, akcentigis pli grave la disidenton kaj bardo montenegrana, Jevrem Berkovicx, dum iu kunveno en la urbo Bled.

Sed la teruro kaj agreseco de la naciisma diktaturo ne estis io neatendita por albanoj. La murdojn, elirojn, persekutojn kaj blankan teruron ni estis travivintaj dekfojojn dum nia historio. Cxu Euxropo ne

rememoras la tragedion de Cxamerio<sup>2</sup>, pli frue tiun de Toplico<sup>3</sup>: se Euxropo sin fermis en sia hipokriteco ecx post la murdoj kaj eliroj grandaj de la jaroj 50, 60, 80 kaj 90 de la lasta jarcento.

Konstatante nur ke tie en Balkanio okazas io terura, nia memoro apenaux povas forvisxi la lamentojn kaj kriegojn pro la murditaj kaj masakritaj infanoj. Suficxas relegi la libron “La militoj de Toplico” de Dimitrije Petrovicx kaj vi estos konvinkitaj en kia Golgoto estas pasinta nia popolo, estos vidinta kie estis gxiaj teroj, aux trafoliumos la sekretajn dokumentojn de la ekstrema ortodoksismo en relacio Belgrado-Ateno..

Ni revenu al la estanteco, kio farigxis komuna maltrankvilajxo. Komence de la jaroj 80 en Belgrado kunvenis unue kaj lastfoje verkistoj serbaj kaj albanaj. Inter la najbaroj oni sercxadis padojn por bonkomprenigxado kaj digneco. Sed kio okazis! La serbaj verkistoj, anstataux subteni la raciajn postulojn de albanoj por pliprofundigi la kunekzistadon en cxi tiu maltrankvila parto de Balkanio, kontrauxe deklaris militon kaj mirigite, tion ili hastis fari antaux Sxesxelo<sup>4</sup>, Arkano<sup>5</sup>, polico kaj serba armeo.

Mi apenaux volas ofendi la kreivan serban geniulon, sed mi ne povas akcepti lin kiel fondinto de naciisma ideologio.

La nomojn menciitaj de Berkovicx mi bedauxrinde jam konis. Ili estis verkistoj kies interna fajro diableca estis venkinta. Nun ili trovigxis cxekape de murdistaj ekspedicioj, etnaj purigadoj kaj genocidaj.

La krima vojo estis jam preparita dum jaroj, kontinuece: el patetiko de viktimo kiel subpremita popolo, persekvita, malbone traktita kaj murdita de aliuloj gxis mistigado de ia folkloreca patoso. Se iu nobelisto, kiel Ivo Andricx, aux iu serba akademiano kiel Vaso Cubrilovicx, unu el la pafistoj- atencantoj de Sarajevo en la jaro 1914, sekvita de eksplodo de la Unua Mondmilito, kuragxis vidalvide al Euxropo, kompili bizarajn ellaborajxojn de la jaroj 1937-1939 je stilo de Gebelso por pereigado de la nacia estado de la popolo kaj sxtato albana for de terfaco, kial ne agu tiamaniere ankaux iliaj posteuloj mezulaj por kiu virto estis la mensogo kaj kiuj sian nacion filozofion starigis super gxi.

---

2 Albana teritorio en Grekio najbare al Albanio

3 Eksaj albanaj teritorioj en suda Serbio apud Nisx

4 Serba ekstremisto jugxata en Hago

5 Serba krimulo sercxata de internacia polico

Aux kiel diras la cxefarkitekto de la naciisma serba ideologio, Dobrica Cxosicx: : Ni mensogas kreativece...antauxpensinte". Kaj tio ne estis kauxzitaj pro ekzistado, kiel opinias Cxosicx, sed por kasxi la perforton, krimojn kaj timon pro kulpeco. Dume, por digneza popolo la murdoj, ruinadoj kaj rabadoj ne estas ecoj de digneo.

Kauxzo por cxi tiu granda defalo, antaux cxio estas la naciisma euforio kiu havis fortan brakon sian pseuxdosceincon tutslavisman ene kaj ekster la lingva region slava, klopodas per cxia rimedo neila auxtoktonecon de aliuloj, do ankaux de albanoj. Kaj tio igas nin pensi ke la serba popolo eksentas ian inferiorecon al la aliaj.

La mondo estas jam klara pri fakto ke la auxtoktona popolo apenaux povas konsiderigxi alveninta. La vero pri albanoj kiel posteuloj de iliroj<sup>6</sup> kaj auxtoktonaj en siaj teroj, de tago al tago plifortigxas per novaj atestajtoj kaj verkoj ne nur de la albanaj sciencistoj.

La partopreno de verkistoj en la naciisma euforio, subkomprenigxas kiel ia malfelicxajxo por la arto kaj libereco de la homo.

En la libroj de la verkistoj menciitaj de Berkovicx enestas profunda maltrankvilo, en la vortoj kaj simboloj iliaj vagadis la malbono, akumulita dum jaroj kaj envolvita per nigra sango. Estis ja tiuj malhelaj imagxoj kaj mortaj enhavoj.

En ili, apenaux oni dedektis ia verkistan manon. La troa kaj aroganta akcentado de la orgojleco kaj nacia sento sukcesis nenigi iun ajn eblan distingon inter naciismo kaj patriotismo.

Estis somerofrue en Bavario kiam mi kolektis la flavajn pecojn de la jxurnajtoj alvenintaj el la restinta Jugoslavio kaj en la rando de la gxardeno ilin mi forbruligis. Unu kaj porcxiam mi deziris min liberigi de terura angoro kiu estis humuliginta la homon tie en la tragika Balkanio. Mi rezignis plulegi la flavan preson kaj pli rare spektis TV.

---

<sup>6</sup> Granda popolo logxiginta tutan Okcidentan Balkanion kaj partojn de Italio

En mia familia biblioteko mi komencis pasigi la tempon pli longe legante verkojn de la antikvaj auxtoroj. Penigis min la vortoj: sango, eliro, lamento, pano. La jarcentofinon mi vidis enirante en mian korton ege laca kaj cxikanita. Mi klopodis dialogi kun la humana, bela kaj viva kiu ankoraux enspiris cxe mi.

La mondo dauxre rondiradis cxirkaux mi laux la legxo de perforto aux kiel mi sxokece nomis kun miaj amikoj: kvazaux la serba demokratio plene floris. La homo valoris ecx ne kvin asprojn.

Mi estis revenante hejmen, kiam en iu montrofenestro por libroj, tie kie antaux kelkaj jaroj oni mortopafis infanon dum iu paca demonstracio de albanoj, atentigis min karakteriza fotajxo ekpaligxinta pli multe pro honto. Estis serba batalanto, revenanta "venkoplene" el iu batalkampo en Kroatio, "donacante" al la mondo rideton karakterizan per vico de homaj fingroj, kiu pendis cxirkaux lia kolo mallonga kaj dika.

La foto parolis pli ol kiu ajn libro pri teruro. Tiu batalanto, per tiu karakteriza pozo de venkinto, pensinta ke tiu fingroj de homoj cxirkaux sia premita kolo estis kvazaux pimentojj rikoltitaj en iu gxardeno de Sxumadio aux Vojevodio, atestanta pri granda malordo en Balkanio. Tio estis tutcerte prototipo antauxanoncite el sia studio de la konata verkisto Oruelo.

La tagoj maloportunis. La fingroj de la homoj cxirkaux la kolo kaj tiu karakteriza pozo de la mizera batalanto okulfrapis al mi kaj precipe min terurigis la glacia silento de Euxropo al kiu apenaux movigxis ecx la okulharo kiam oni sendis al gxi kiel donacon la dehakitajn homkapojn. Sur mia ajxoj jxus komencis etendigxi la mortoombro, mi skribis al mia plumamiko:

"Mi petas, diru al mi, por kiun ni verku?"

Lia respondo estis rapida kaj senekuivoka:

"Pri Balkanio mi jam scias kie trovigxas, sed Serbio probable ne trovigxas en Euxropo.."

Li estis intelektulo en iu metropolo.

Dum la legado de la libro "Regxlado de Osmanoj" de bone konata turkologo auxstra Joseph von Hamer, de cxapitro al la cxapitro, mi malkovris grandajn mistikajxojn en multaj verkajxoj legitaj de mi antauxe,

pri kies vereco kaj valoroj mi estis dubinta. La perdita tempo doloris al mi kaj penigis min la homa kaj kreiva mizero de auxtoroj venenigitaj generaciojn da legantoj kaj disigitaj popolojn.

Cxikaze oni devas mencii, antaux cxio, la Miton pri Batalo de Kosovo – kampo (Dardanio), ties naskigxon sur la spiritaj ruinaĵoj kaj ege traktatan en la historiografio de ambaux jarcentaj najbaroj- serboj kaj albanoj. Dum serboj deklaras la Batalon de Kosovo-kampo kiel sian justan, albanoj konsideras gxin milito de la balkana koalicio kie unuafoje estigxis unuigxo pro granda malbono trafinta ilin.

Dum serboj la Miton pri Kosovo starigis kiel aferon ekzistanteca de serbismo kaj arde volas atesti sian auxtoktonecon en fremda tero, albanoj ne suferas pro tia komplekso. Per la Mito pri Kosovo albanoj rememoras la malfelicxojn kiuj kiomfoje trafis la popolojn de cxi tiu regiono, cxi lastaj forgesis la malamikajxojn inter ili.

Cxe albanoj la Mito kondukas al bonkomprenigxado, kunekzistado kaj paco. Tion ne akceptas la serba flanko pro hegemoniaj celoj.

“La Regxlando de osmanoj”, ora sxlosilo, malfermis al mi la pezan pordon de la malhela vilajeto kaj instigis min relegi multajn verkojn kiujn mi estis forjxetinta en la angulon de mia familia biblioteko. Mi malbenis la balkanajn verkistojn cxar ili estis preterlasintaj vivecan sxancon por plifortigi la kunekziistadon en la regiono.

Nia elstara verkisto monde konata, Ismail Kadare<sup>7</sup> aliris al la pasinteco per nova sentemeco kaj historia vereco, respektante kaj aprecante ankaux la klopodojn de aliuloj dum la migrado disde la malproksima lumo de la malhela vilajeto.

Simile estis aginte ankaux la honorinda auxtra historiisto Joseph von Hamer. Dudek jarojn li pasigis en la arhivoj de osmanoj, sercxante la veron pri kio okazinta en Balkanio en la pasintaj tempoj.

Malgraux la klopodoj de la verkistoj kaj intelektuloj albanaj por starigi pacan dialogon kun la serbaj verkistoj, la kultura kaj fizika genocido al la albana etno en la restinta Jugoslavio dauxre ricevis

---

7 Eminentu albana verkisto plurfoje kandidato por la Nobelpremio

katastrofecajn dimensiojn ecx por la tuta regiono. Gxis kie estis atinginte la paranojo kaj radikalismo de iu mezepoka serba politiko bone estas ilustrite per la jena anekdoto cirkulinta:

“Kion faras serbo kiam malhavas monon? Li iras al Kosovo, mortigas iun albanon kaj atendas Sxesxelon por ke cxi tiu lasta sendu al li 50 DM por la murdita albano!”

Tiu maldolcxa vero, pli tragika pro mem la serba sxtata politiko, rememorigas bizaran konsilon dum la tempo de Pasxix8:

“Nasku tiom da infanoj kiom da albanoj vi mortigas!”

Ne estas komento por tiu homa frenezajxo. La perforto kaj krimeco disvolvigxis kontinue, antauxpensite.

Kauxzo po tiu tensiigxinta stato, ne nur en la albana spaco, antaux cxio estas la ellaborajxo kaj memorandumoj de la serbaj verkistoj, kiuj instigis la perforton kaj bibliajn elirojn. Terura estas cxi tio, kiam la silent de Euxropo estis falsa.

Oni devas ami la popolon kaj kulturon sian kaj mi ecx ne kontrauxas ilin kompilantaj naciajn programojn. Sed mi tute kontrauxas tiujn ruinigantaj la homan trankvilon. Mia popolo ne akceptis la perforton kiel rimedo por solvi la konfliktojn.

Oni starigas la demandon:

C’u ebals eskapi de tiu probabla katastrofo kaj revenigxi la paco en niaj teroj? Aux antaux tio ni devas skuegi la demonojn, Kapojn kaj vortojn. Nia plej sekura patrio estas la Homo.

Tradukis Bardhyl Selimi

Eseo

Centjariĝo



Nur du jaroj antaŭ la komenciĝo de la Unua Mondmilito naskiĝis en Balkanio la nova sendependa ŝtato de Albanio. Ĝi estis la lasta el la iama Otomana Imperio en la Duoninsulo kiu akiris sian memstarecon. Sed tio estis entrepreno ege doloriga kaj drameca.

La “malsanulo” de Bosforo obstine klopodis pluteni en siaj manoj la okcidentan ekstreman provincon, el kiu ĝi estis devigite plurfoje donaci al la jam ekzistantaj suverenaj ŝtatoj najbaraj (Montenegro, Serbio kaj Bulgario), diversajn grasajn pecojn dum XIX jarcento, kiel ekzemple tio okazis post la ruso-turka milito de la jaro 1878.

Tial albanoj ribeliĝis plurfoje en la jaroj 1910, 1911 kaj 1912, precipe en Kosovo-regiono. Ili sukcesis eĉ okupi urbojn de Priština kaj Skopje.



### Balkanio antaŭ la Unua Mondmilito

Dume la registaroj de Serbio, Montenegro, Bulgario kaj Grekio decidis alianciĝi kontraŭ Otomana Imperio por ke, post la venko, ili disŝiru el ĝi pliajn teritoriojn, plejmulte el la albanaj vilajetoj (Shkoder, Kosovo, Manastir, Janina). Ilin forte subtenis Rusio, kiu intencis krei tiel en Balkanio iun fortan baron kontraŭ Aŭstrohungario. Ĉi lasta kontraŭe pludeziris ke oni konservu la aktualan politikan staton.

Sed la 7-an de oktobro 1912 Montenegro deklaris militon al Turkio, sekvata la 17-an kaj 18-an de oktobro de la ceteraj ŝtatoj. 286 000 serbaj soldatoj eniris albanajn teritoriojn en Kosovo, Makedonio kaj Albanio, frakasante la turkan armeon en pluraj frontoj. Ili dezertigis centojn da vilaĝoj kaj mortigis dekmilojn da albanaj civilulojn, strebante “etnopurigi” la okupitaj teritoriojn. Same agis 20 000 montenegranaĵoj soldatoj, centmiloj da grekoj kaj bulgarioj.

Albanoj alarmiĝis kaj tuj organizis sian fortan rezistadon. Multaj iliaj gvidantoj kunvenis urĝe kaj decidis fari plejblon por konservi tion kio estis savebla el siaj teroj. Delegacio estrata de Ismail Qemali vojaĝis al eŭropaj centroj (Vieno, Londono, Romo, Budapeŝto k.a.) por peti la kunsenton de ties registaroj.

Subtenita de Aŭstrohungario kaj Italio, ĝi alvenis en la urbo de Vlora, ĉe Adriatika marbordo ankoraŭ libera kaj kunvokis ĝeneralan kunvenon de reprezentantoj el tutaj albanaj teritorioj. Tiel, la 28-an de

novembro 1912, tagmeze, oni sukcesis unuanime deklari antaŭ la popolo arigita ekstere la sendependecon de Albanio.



La deklaro de sendependeco en Vlora

Kvarcent volontuloj el la jam okupita Kosovo, gviditaj de Isa Boletini alvenis tagon poste por subteni la novan unuan albanan registaron, estrata de Ismail Qemali, kiu siaflanke alvokis al la registaroj eŭropaj agnoski la sendependecon de la lando.



La alveno de 400 kosovaj volontuloj

Dume la ceteraj partoj de la lando suferis la sovaĝan kaj sanguman okupadon fare de armeoj de la najbaraj ŝovinismaj landoj. Shkoder kaj Janina daŭre estis sieĝataj de serbo-montenegranoj kaj grekoj.

La grandaj potencoj maltrankviliĝis pro la nova statuso politika en Duoninsulo. Ili kunvenis en Londono por decidi pri la novaj landlimoj. Rusio deziris ke Albanio estu nur ŝtateto ampleksinta la mezan Albanion, dum Aŭstrohungario celis pli larĝan landon, ampleksinta krom Albanio ankaŭ certajn teritoriojn albanaj en Kosovo, Grekio, Makedonio kaj Montenegro.

Rezulte, oni decidis pri la aktualaj landlimoj de Albanio, t.e. amputita lando kaj nacio, ekster kiu etendiĝis pli ol duono.

Kiel ajn, albanaj gvidantoj konsideris tion ian gravan akiraĵon, ĉar la nova sendependa ŝtato fariĝus forta subteno por ĉiuj albanoj en la Duoninsulo.

La vivo de la unua registaro de Ismail Qemali estis mallonga ĉar Eŭropon trafis somerofine de 1914 tragika milito. Albanion denove eniris la armeoj de ambaŭ intermilitantaj aliancoj, foje aŭstroj kaj bulgaroj, foje francoj, serboj, grekoj, italoj kaj aliaj. La lando pludezertiĝis ĝis la fino de tiu fifama mondmilito.

Granda danĝero stariĝis denove dum la Packonferenco de Versaĵo, ĉar la ŝovinismaj registaroj najbaraj faris plejblon por elŝiri pliajn partojn el teritorio de la restinta sendependa Albanio. Sed tion malhelpis notinde ne nur la forta volo popola albana, esprimita en la Kongreso de Lushnja januare 1920, sed ankaŭ la subteno fare la deklaro de usona prezidento Uilson favore al la memdecidemo de popoloj.

Finfine oni akordiĝis lasi Albanion trankvila en sia memstareco, eĉ invitis ĝin al la Ligo de Nacioj en la jaro 1921. La jaroj 1921-1924 notas interesan periodon de parlamentarismo nekonata antaŭe ĉe albanoj, kiu konkludiĝis per registaro de Ahmet Zog, elektita prezidento en 1925 kaj poste reĝo en 1928. Ĉi lasta invitis fremdajn kompetentulojn por organizi modernan administracion, armeon kaj policon kaj entreprenis diversajn centralizigajn reformojn.



Ahmet Zog La Unua

La okupiĝo de la lando far faŝisma Italio la 7-an de aprilo 1939 kaj mem la dua mondmilito notis alian malfacilan periodon por albanoj, sed ankaŭ novan statuson de ties landlimoj. Ekde aprilo 1941, nazioj aneksis al Albanio multajn teritoriojn okupitaj de Jugoslavio en Kosovo, Makedonio kaj Montenegro. Ĉi kaze tie ekfloris unuafoje albanlingvaj lernejoj kaj administracioj.



#### Albanio en la jaroj 1941-1944

En la jaro 1945, fino de la dua Mondmilito, Jugoslavio rekaptis Kosovon kaj Makedonion. Plue, stariĝis nova danĝero en la Packonferenco de Parizo, ĉar Grekio pretendis tutan sudan parton de la tiel nomata “Londona” Albanio, t.e. sudan Albanion. Bonŝance, la komunisma reĝimo instalita enlande akiris fortan subtenon fare de tiama Sovetunio kaj Jugoslavio komunismaj.



La komunisma diktatoro Enver Hoxha

46 jarojn, la lando plurestis sub totalitarismo komunisma kaj post 1961 jaro, eĉ des pli, post 1978 jaro, en tuta izoliteco, ĝis en la jaro 1991 la sistemo politika kolapsis.

Ekde tiam albanoj aliĝis la la eŭropa granda familio kies parto natura ili jam estis ekde jarcentoj. La ekonomia nivelo pliboniĝis notinde (la enspezoj averaĝaj pokape altiĝis de 300 USD ĝis 4500 USD) kvankam ankoraŭ la lando konsideriĝas la plej malriĉa en la malnova kontinento.

Ekde la jaro 1999, albanoj havas duan sian ŝtaton kiu sendependiĝis en 2008. Tio estas Kosovo. Kunlaborante en ĉiuj kampoj ambaŭ ili sin pretigas aliĝi estonte al EU.

Bardhyl Selimi

Sekreta interkonsento

(--Marrëveshje e fshehtë-----)

Kiam mi havis dek unu jarojn, mi streĉegis mian atenton, por ekscii, kie malapersas la kudrilo, per kiu Dina - sidante kun siaj koleginoj en la korto – brodadis tolon sur la ringo.

Ŝi ĵus finis dudek kvin jarojn kaj havis eksterleĝe unujaran infanon kun iu orgojla futbalisto.

Dina tiris fadenon – foje de malsupre, alifoje de supre, kaj ĉar ŝi tenis la kudrilon ĉe la kokso, mi timis, ke ŝi pikos sin.

Ĉi tiu kudrilo malaperadis sub la jupo, inter ŝiaj femuroj kaj tute nekomprenebla por mi estis la mekanismo, kiu elpuŝis ĝin supren.

Lun tagon ŝi preskaŭ tordiĝis de rido, kiam ŝi vidis, ke serĉante la kudrilon mi kliniĝis kaj rigardis sub la jupon el blua kretono.

Mi kliniĝis pli malalte, sed mi ne ekvidis, kie sin kaŝas la kudrilo, sed ion alian.

Dina ruĝiĝis kaj ekkriis kolere:

- Kion vi faras? Ĉu vi estas freneza! Kion vi serĉas tie, ci malgranda vagabondo?

- Vian kudrilon – mi respondis hontigite.

La mokrido de la koleginoj obtuzigis mian respondon.

Mi ne havos tiom da kuraĝo, por ankoraŭfoje rigardi, kie sin kaŝas la kudrilo sub la brodringo.

Lun pluvan tagon Dina sekrete vokis min al la pordego de sia domo,

Ŝi glatumis malsekajn harojn sur mia kapo kaj demandis:

- Kara knabo, ĉu vi farus ion por mi?

Ŝi estis pala, kaj ĉirkaŭ ŝia vizaĝo tordiĝis peĉnigraj bukletej

- Kion?

- Vi portos leteron al la domo de tiu futbalisto ĉe la najbara strato. Vi scias, kie?

- Kompreneble.

La sportisto estis konata en la tuta lando kaj ni, infanoj, fieregis, ke ni loĝas en la sama kvaertalo.

- Redonu la leteron nur al li – ordonis Dina. – Se li ne estos hejme, reportu ĝin al mi.

Kaj ankoraŭfoje ŝi tuŝetis miajn harojn per la mano. Mi estis en la sepa ĉielo.

- Kaj ĉu li scias, ke mi venos? – mi demandis forirante.

- Li scias, jes, li scias, ĉagreniĝu pri nenio, li akceptos vin tre bone, vi mem vidos.

La futbalisto loĝis en la belega vilao sur la korto kun pordego, kiu estis fermita, ĉar la hejmanoj timis, ke iu povas ŝteli al ili figojn, sed ni, infanoj, supersaltadis la altan barilon kun vitropecoj supre kaj forprenadis fruktojn, mordetante ilin pli frue. Ni devis mordeti multajn figojn, antaŭ ol ni trovis maturajn. La malmolajn ni forĵetadis, ĉar ili estis tiel agacaj kaj acidaj, ke ni tusokraĉegis.

Mi iris en pluvo, Mi ne povis rezisti al la tento por tralegi ĉi leteron. Kaŝita en iu pordego, atenteme mi elprenis paperfolion el la koverto kaj komencis legi kun timo,

La letero estis skribita mallerte, kiel per la mano de iu, kiu ne finis eĉ sep klasojn. Dina skribis:

Land, mi pardonpetas, ke ankoraŭfoje mi afliktas vin. Pli longe mi ne povas zorgadi pri mi kaj la fileto. Li kreskas, bezonas manĝaĵon kaj vestojn. Mi ne havas monon, nur tiom, kiom de tempo al tempo mi ricevas por brodado. Vi scias bone, ke kiam mi iros al la tribunalo, vi devos pagadi al mi ĝis li finos dek kvin jarojn. Sed mi ne decidiĝos por tio, vi ankaŭ havas infanon kaj la tutan familion por vivteno. Mi volas, ke vi pagadu al mi negrandajn sumojn ĝis la knabeto finos tri, kvar jarojn.

Mi petas vin kiel homon, ĉar mi scias, ke pri la amo eĉ ne estas parolinde. Ne sufiĉas, ke ĉiuj moke rigardas min, sed mi ne scias, per kio mi vivtenu la fileton... vian... nian. Li similas vin kiel unu akvoguto al la alia, tio signifas li havas viajn grandajn okulojn.

Land, bonvolu kompreni min, ĉar alie... mi ne scias, kio plu okazos.

Furioza mi ekiris al la domo de tiu aĉa sportisto kaj pugnobatis la pordegon.

El la profundo aŭdiĝis voĉo:

- Kiu?

- Mi – mi kriis ekscitita.

- Kiu „mi”? Kiel vi nomiĝas?

Mia infana voĉo kolerigis lin.

- Mi – mi respondis tremvoĉe – mi havas leteron por vi.

- De kiu? – la voĉo iom mildiĝis.

Mi ne estis preta al tio. Do., mi silentis. Mi ne povis ja diri, kiu donis al mi la leteron.

- De kiu vi ricevis ĝin?

- De ŝi – mi elbalbutis – ŝi petis, ke mi ne diru ŝian nomon.

Ŝajne tio estis konvinka, ĉar li malfermis la pordegon. Sed li ne plu fidis min .

- Nu, kion vi volas? – li kriis malŝate.

„Kaculo” - mi diris en la animo kaj fierege donis al li la leteron.

Li malfermis ĝin kaj eklegis. Kontente mi rigardis, kiel ĉi tiu idolo de la stadionoj ĝibiĝas, ju pli longe li legas dramajn versojn.

Li finis kaj diris nenion. Nur lia piedo nerve frapfrapis.

- Ĉu vi legis ĉi leteron - li demandis frakasita.

- Ne – mi mensogis.

Li suspiris profunde, ĉirkaŭrigardis kaj diris mallaŭte:

- Bone, atendu momenton ĉi tie, mi revenos post du minutoj – kaj li eniris la domon ŝanceliĝante kiel ebrulo.

Li revenis kaj donis al mi rulaĵon da monbiletoj per la tremanta mano. Li glatumis miajn harojn kaj diris:

- Tri miloj estas por Dina, kaj dudek lekoj por vi. Aĉetu kukon. Redonu al ŝi la monon, kaj nur poste revenu hejmen, ĉu bone, knabo?

- Bone – mi diris kaj volis foriri.

- Atendu... restu ĉi tie... Mi donos al vi iom da figoj – li proksimiĝis al la arbo.

- La maturajn – mi postulis.

- Bone, sed mi ne spertas pri tio – li ŝajnis iom afliktita.

- Sed mi scias, kiel elekti – mi alproksimiĝis kaj per la okuloj de spertulo komencis serĉi fruktojn sur la arbo.

La futbalisto videble perdis sian paciencon, kaj mi dume elektis malrapide, tuŝis, mordetis ĝis mi trovis dolĉajn figojn.

- Mi havas! – mi kriis.

- Tre bone – li diris kaj rapide kondukis min al la pordego.

Mi foriris kontenta post la farita tasko..

Mi kuris al Dina, kiu demandis min pri ĉio. Mi rakontis al ŝi precize, ankaŭ pri la figoj, sed tio apenaŭ interesis ŝin. Ŝi volis ekscii, ĉu mi havas leteron por ŝi, kaj kiam mi respondis, ke mi ne alportis ĝin, ŝi suspiris:

- Ruzulo, li lasis nenion skribita, sed ĉu estas pli grava pruvo ol la fileto.

Poste ŝi rememoris min, varme kisis mian vangon kaj antaŭ ol foriri, ŝi serĉis ion en la poŝo. Ŝi elprenis dek lekojn kaj diris:

- Aĉetu por vi kukon.

- Mi ne volas – mi respondis brave – mi ne faris tion por mono.

- Do, kial?

Mi silentis.

La sekvan tagon denove mi eksidis antaŭ Dina, kiam ŝi brodis. Dum ŝi babilis kun siaj koleginoj, mi kliniĝis, tremante, por vidi... kie malaperas la kudrilo.

Dina rigardis min, sed nenion diris. Ŝi ŝajnigis, ke ŝi ne vidas min,

Du tagojn poste, kiam mi denove kliniĝis, ŝi kroĉis al mi sian malŝatan rigardon kaj diris malrapide:

- Kion vi serĉas tie? Sufiĉas!!

Mi foriris hontigita.

Post monato Dina vokis min denove „kara knabo” kaj petis, ke mi portu ŝian leteron al la futbalisto. Mi konsentis tuj, sen pliaj klarigoj.



Kompreneble mi tralegis dumvoje tiun leteron, kiu grandparte ne ŝanĝiĝis, sed ĝia tono estis pli senespera kaj urĝiga.

Ĉi-foje la futbalisto tuj rekonis mon laŭvoĉe kaj kuris al la pordego.

Mi donis la leteron kaj atendis. Li volis montri sin kvieta. Sed denove li ne povis ekregi tremadon de la piedo.

- Serĉu figojn por vi.

Baldaŭ li alkuris kun mono, penspirante. Li donis al mi dudek lekojn kaj ne sciante kion diri, li demandis”

- Nu, ĉu vi trovis?

Li foriris, sen atendi mian respondon.

Mi redonis la monon al Dina. Ŝi kalkulis, murmuris ion subnaze, glatumis miajn harojn kaj foriris.

La sekvan tagon ŝi permesis al mi denove rigardi, kie malaperas la kudrilo. Kvazaŭ ŝi ne estus vidinta min.

Mi provis ankoraŭfoje post du tagoj, sed kiam mi rigardis sub la jupon, ŝi eklekis kolere:

- Kion vi faras? Ĉu vi frenezeiĝis?

Mi foriris. Ŝiajn koleginojn tio amuzis denove, sed poste ili forgesis pri mi.

Mi jam sciis, ke ni interkonsentis sekrete pri tio, ke post ĉiu letero al la futbalisto mi povis nur unufoje rigardi tien, kie malaperas la kudrilo.

Pli-malpli post monato, kiam mi ricevis la trian leteron, Dina estis tre malagrabra kaj malgaja. Ankoraŭ pli orgojla estis la sportisto, kiu ne kaŝis sian koleregon, kiam li nur ekvidis min.

- Atendu momenton – li diris malamike – serĉu figojn por vi.

Post momento li alkuris, rigardante dekstren kaj maldekstren, donis al mi la monon kaj neatendite eksplodis:

- Diru al ŝi, ke ŝi estu prudenta! Mi havas la familion, ĉu ŝi imagas, ke... - kaj li flustrigis sian voĉon.

Ŝajne li forgesis, al kiu li parolas, ĉar post momento li diris:

- Poste mi povos iel ordigi tion kaj kompreneble memoros pri mia filo kaj pri ŝi...

Estis malagrabla rigardi lin. Li parolis al mi, kaj mi havis antaŭ la okuloj tiujn maĉojn, dum kiuj li ardigis homojn en la stadiono, tuj poste, kiam li tuŝis pilkon.

Sed rapide li ekregis sin:

- Diru ĉion al Dina aŭ onklino Dina, kiel vi nomas ŝin... Kaj bonan nokton ! – li mallaŭtigis la voĉon kaj foriris tra mallumo.

Sed post momento li alkuris denove.

- Mi forgesus... dudek lekojn.

- Ne, dankon, ne estas necese – ĉi-foje mi obstiniĝis.

Mi klopodis rakonti al Dina, kion mi aŭdis, kaj ŝi postulis, ke mi ripetu vorton post vorto, ŝi deziris eĉ koni la tonon de lia voĉo. Kelkfoje ŝi ordonis al mi ripeti la frazon: „Kompreneble mi memoros pri mia filo kaj pri ŝi”. Finfine ŝi diris kun amaro:

- Kanajlo, ĉu li tute forgesis, kio okazis inter ni!

- Pri tio li ne parolis – mi provis kreskigi en ŝi la malamon, sed miaj klopodoj ŝajne ne impresis ŝin, ĉar enpensiĝinte ŝi demandis:

- Hm, kion li ankoraŭ diris?

- Nenion – mi respondis kun ia kulposento.

Ŝi glatumis miajn harojn kaj foriris.

La sekvan tagon denove mi serĉis la kudrilon malaperantan sub la brodringo. Sed Dina estis kolerega, rigardis min kun malŝato, kaj post momento kunpremis la femurojn.

La transdono de ŝia kvara letero okazis en silento. La futbalisto klarigis al mi, ke jam estas la lasta fojo, ke mi ne provu ankoraŭfoje, ĉar alie... Li ne permesis al mi preni eĉ unu figon.

Kiam mi redonis la monon al Dina kaj ripetis, kion diris la futbalisto, mi komprenis, ke tio signifas la finon de nia interkonsento. Kaj kulpas tiu fama sportisto

- Li nur parolas tiel – mi klopodis trankviligi Dinan – sed helpi vin li ja devos... Ne povas okazi alie, li timas. Kaj li tremegas ĉiufoje, kiam li vidas min.

Sed Dina ne volis ekkoni miajn argumentojn. Ni disiĝis malvarme, ŝi eĉ ne glatumis miajn harojn.

Neniam plu ŝi vokis min.

Kelkfoje mi sidiĝis antaŭ ŝi, kaj ŝi traktis min kiel aeron kaj obstine enbatis sian kudrilon en la tolon. Ŝi brodis kaj ploris.

Do, ĉio finiĝis inter ni.

Poste Dina malaperis dum kelka tempo kaj revenis sola, sen la fileto. Ŝi estis malfortiĝinta kaj pli silentema. Ŝi brodadis pli kaj pli longe, kaj li ŝotadis pli kaj pli multe da goloj. Kaj kiam li promenis kun sia belega edzino brak-ĉe-brake en nia strato, li ŝajnigis, ke li ne konas nin. Kiomfoje ili preteriris, mi rigardis okulangule Dinan kaj volis krei:

„Ĉu vi donos al mi iun leteron por li aŭ ne? Rigardu ĉi kanajlon, kiel li fieregas pri sia edzino. Kvazaŭ nenio estus iam okazinta. Ne estas mia afero, nek tio interesas min, sed oni ne povas pardoni al li. Kio li estas? Granda heroo? Mi scias, kiel tremas lia piedo, kiam mi donas vian leteron al li”.

Sed Dina brodadis silente. De tempo al tempo ŝi ploris kaj ne ĉesigis la brodadon.

La sekva atestanto

(Njĉ tĵeter dĉshmitar)

Ho, kiel sence! Ĉu oni povas atendi, ke io fariĝos el nenio,

ke la infana ploro mem naskos sin

inter lavitaj kaj gladitaj litotukoj,

asepsaj iloj, en la malfermita glutejo de la korbo por miaj biologiaj vokaloj

kaj kun kuracisto el la nokta Deboro, kiu dormetas sur la tabureto

kiel mastrino atendanta la revenon de sia edzo post ĉasado?!

Duono de mia korpo, turnita kiel katapulto al la muro desinfektita per lisolo,

Ne obeos al la ordono de ekstere, por veki malkontenton ĉe tri generacioj

sidantaj en mi

kiel unusola motivo de kontinuo.

Tio estos same malfacila kiel al birdo-krio ruliĝi lavangon.

Krakas la fenestro, ĝardenoj kun semita tabako

kliniĝas estimoplene antaŭ la Sinjoro, kiu kreis doloron. Sekvas ploro.

Ni rigardu, kiu el miaj avinjoj aŭ praavinjoj falis en ĉi tiun kaptilon,

kiu ateste elektis la korpon de mia filino,  
por rakonti: kion ŝi vidis, kion ŝi aŭdis, kion ŝi tuŝis,  
sed neniam kion ŝi pensas - la atestanto ne rajtas pensi  
tuj poste, kiam li ĵuros al la malplena kovrilo sur la vero  
per la mano de la analfabetino.

Vi estas unu el ni  
(Ti je njëra nga ne)

El sep semajno-tagoj ok paliĝas  
Sub la brakoj kaj sur la brusto kiel trelika vesto.  
Vi estas unu el ni.

El sep virinoj ok havas varikojn,  
Kaj la renoj kovritajn per lana zono.  
Vi estas unu el ni.

La plej juna imitadis doloron de la patrino –  
kun manoj sur la talio ŝi iras pli mallongan ĉirkaŭvojon al la vero.  
Vi estas unu el ni.

Kun buŝo plena de ovoj ili rakontis sonĝojn  
kaj sufokis per ŝtonoj kiel fajrojn bruligitajn de infanoj.  
Vi estas unu el ni.

Aŭ vi malestimos ilin, aŭ ili malestimos vin,  
se vi estas semo, kiu ne ellasas radiketojn.  
Kaj kiam mi elpoŝigis malestimon kiel tranĉilon,  
ili mallonge interrompis:

„Atentu, ĉar vi vundos vin. Remetu ĝin en la poŝon!”

Vi estas unu el ni.

Niaj homonimaj vivoj. La mia ne estis ia escepto.

Teksis ĝin mizero – tiu malnova skribmaŝino

sen akcentoj.

Vi estas unu el ni.

Mi, unu el ili,

kvankam mi troviĝis en du lokoj samtempe,

portadis malkaran antaŭsenton

pri alia vivo. Alternativa.

Kelkaj spasmoj de l' diafragmo

(Ca ulje e ngritje diafragme)

La urbo etendiĝis. Inter la sola buso-stacio kaj la tombejo  
estas kelkaj spasmoj de l' diafragmo.

Vidvino sidas sur la benko. Atendas. Kunpremas per fingroj monerojn por  
bileto.

Dum la unua duonjaro ŝi aĉetadis bileton monatan.

Kiam ŝi revenos hejmen, ŝi desinfektos sin per rakijo ĝis la ŝultroj,  
kvankam sur la korpo ŝi havas eĉ ne grataĵon.

Alia vidvino eliras el buso, turnas la kapon por memori ĝian numeron  
kiu estas sama kiel la numero de la morto-atesto.

Ŝiaj floroj kaj mamoj velkis.

Falas pluveto – kiel apostrofo

ĝi mallongigas la ponton inter du mondoj.

Vintre en la haltejo estas neniuj,

pro alkutumiĝo la ŝoforo atendas kun bruanta motoro.

kaj cigaredstumpo algluita al la buŝo.

Post momento la pordo mem fermiĝas, risortoj okupas sian lokon

Kiel frazoj en aserto.

Oni ne scias, kiu invitis kiel la unua al la danco:

Cu la urbo la tombejon aŭ la tombejo la urbon.

En la freneza tango la brakoj forpuŝas unu la alian, la koksoj altiras sin

reciproke

kiel fluoj en la neŭtrala maro-zono.



En la loko sen nomo

(Nĕ vendin pa emĕr)

Oni ne devas respondi skribe demandaron  
nek lasi kun abomeno fingro-depremaĵojn.

Neniu fremdulo detruos ion  
tie, kie ĉion konstruis fantomoj,  
kaj ŝtonegojn por temploj oni posttiris kilometre  
por ĝuadi la geometrion de ombroj.

Ne estas ŝlosiltruoj, ĉar kion oni povus ŝteli  
en la urbo-ŝtato de mortintaj poetoj?  
Leterkestoj defalas kiel malsekaj plastroj  
de la brovohaŭto krevinta dum junulaj interbatiĝoj.

La urboj sen neonlampo, sen belaj virinoj,  
kun rideto natural anti-cavity,  
kun stratoj kurantaj al la periferio, ĝis la kono-limoj,  
kie diktatore regadas herbero.

Mi salutas. Respondas neniu.

Kian sencon havas feliĉo-deziroj al iu,

kiu naskiĝis kaj mortis samtage aŭ je la sama horo?

Jen, kie estas ĉiuj sur mia skribotablo –

sur la kovriloj de libroj la malgrandaj fotoj

kun la Edena ĝardeno en la fono,

algluitaj kiel kvitanco-folioj al la vestoj en la kemia lavejo.

Por sproni atenton

(Për pak vëmendje)

Mia filino ridas,

ke mi vestiĝas kiel infano,

ke ĉiam mi enŝovas pinglon en miajn harojn

kiel malgranda knabino kun blankaj ŝtrumpetoj

sur la balancilo, atendanta senpacienco

ĝis iu

puŝos ĝin unuafoje.

Aliaj ridas pri tio, kiel mi paŝas,

kiel mi manĝas per unu mano aŭ dormas sur la ventro.

Mi ankaŭ ridis pri mia patrino,

kiam ŝi iris al la kunveno de la gepatroj en la lernejo

kun haroj ankoraŭ malsekaj post la bano, kun kafo-restaĵo en la buŝanguletoj,

en nekonvena vesto, kun dikaj ŝtrumpetoj,

kun medaliono sur la brusto, flaviĝinta pro la suno kaj metita en la kadrojn

de la eksmoda kolumeto

Jen, ni estas nun kiel du planoj de la sama korto –

unu antaŭ, kaj la alia post la domo.

Ĉiu volas sproni atenton siamaniere:

ŝi enbatas kiel derviŝo pinglojn sub la haŭton,

kaj mi kunpremas ĉokoladajn arĝentfoliojn en buletojn.

2012/9/5 Bert Schumann <bert.schumann@gmail.com>

Estimata redaktoro

Mi petas vin publikigi aŭ dissendi la sekvan anoncon, se tiu aperos antaŭ fino de oktobro.

Bonvolu respondi ĉu eblos aŭ kiel mi kontaktu vin estonte.

Antaŭdankas Bert por Greziljono

- - - - -

+ AŬTUNE +

Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj.

Kursoj, koncertoj, muzikado, manĉo, promenado, ludoj, kaj aliaj aktivajoj laŭ via elekto.

Specialaj gastoj : Svetlana Smetanina el Moskvo kaj Kees Ruig el Nederlando.

de sabato, 27-a de oktobro ĝis sabato, 3-a de novembro 2012,

en la fama kastelo Greziljono, franca Kulturdomo de Esperanto.

Detalaj informoj en reto: [www.gresillon.org/autune](http://www.gresillon.org/autune)

Kontakto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), tel. 0033-2.41.89.10.34

Adreso: Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, F-49150 St. Martin d'Arcé

- - - - -

La simbolo de la aranĝo estas skarabo sur falinta folio :

<http://gresillon.org/local/cache-vignettes/L140xH140/rubon36-b5c6e.png?1345917169>

Fotoj de la kastelo troviĝis en tiu paĝo [gresillon.org/fotoj](http://gresillon.org/fotoj); elektu laŭvole.

Paiva Netto

Meditadoj el la animo

Antaux nelonge atingis nin tre interesa filozofia verko de s-ro Jose de Paiva Netto, direktoro-prezidanto de la Legio de Bona Volo, Brazilo. Tiun taskon li ekzercas ekde la jaro 1979. Jen kelkaj valoraj pensoj el tiu libro:

Se militoj naskigxas en la menso de homoj, do en la menso de homoj oni konstruu la bastionojn de Paco.

La vizagxo de Dio estas Amo. Ju pli ne amas, des pli Li manifestigxas en ni.

Kuragxo ne estas fanfaronado. Cxiu fanfaronulo estas malkuragxulo.

Kiu praktikas Karitadon kaj persistas en gxi, tiu ricevas de Dio Lian Karitaton, tio estas, Lian Senfinan Mizerikodon.

Ni senlace laboru por ke oni forigu militon el la koroj. Armitaj pafoj ne okazas per si mem. "Sed, okaze de akcidento?!", oni povus demandi. Nu estus preferinde, ke oni ne fabriku ilin!

En tiu cxi momento, kiam la mondo kurbigxas sub la dangxero de kompleta neniigxo, Politiko, Religio, Filozofio, Scienco, Ekonomio, Arto, Sporto, k.a. kvazaux petegas profundan transformigon tiel ke xi havu kiel standardon Ekumenismon de Frateco, kiun oni neniamj malsuprenigu.

Antauxvidema estas tiu homo, kiu starigas baron antaux la alveno de la inundo. Paranoja estas tiu, kiu faras la samon sen ia kauxzo.

Timi estas same kiel diri al Dio; "Mi ne kredas Vin, Sinjoro". Kaj tion ni neniam faros.

Unu afero estas Frateco; tute alia afero estas favorado. Antaux cxi tiu lasta, la Spirito vomas, cxar gxi kondukas al korupto.

Defioj en la ekzistado pusxas nin al sukceso, Sed necesas ankaux, ke ni estu optimismaj kaj grandanimaj, por ne fali inter la ungegojn de detrua egoism.

La koro estas mikrofono kaj lauxtparolilo preferataj de homamasoj.

Kiam ekzistas vera estimo, ecx distance alproksimigas korojn. Ne ekzistas disigxo inter tiuj, kiuj fortigas agordon en la plej granda forto de la Universo: la senkompara Amo de Dio.

La koro farigxas pli auxskultema kiam la Amo estas la fundamento de la dialogo.

Kiam oni pregxas la Animo spiras nkaj fekundigas la human vivon. Pregxi estas essence, por sennebuligi la horizonton de la koro.

Nenio estas pli efektiva ol frata alproksimigxo al la koro de homoj. Cxio cetera estas burokratio, bona aux nebona.

Lauxgrade kiel ni maljunugxas, pli rapide la estonteco alproksimigxas al ni. Maturigxo rejunigas nin, kiam ni tenas la Animon prilumita per bona, vivanta idealo.

Kiu ne kapablas preni gxustan sintenon fine konsumigxas de la cirkonstanco kreita de lia propra forest.

Mono kaj famo povas farigxi ia peza sxargxo por la Homo. Malofte ili kondukas al felicxo. Escepte se ili respondas al bonfaroj favore al kolektivo. Jen estas vojo por Paco inter tiuj, kiuj cxion havas kaj tiuj, kiuj bezonas helpon: Solidareco

Kiam Vi komprenas la sencon de abnegacio, tiam Vi lernas ami. En tiu momento auxtentika felicxo kaptas vian koron.


Oni devas kulturi solvojn tie, kie iuj homoj trovas nur problemojn. Oportunajn okazojn Dio cxiam plantas cxirkaux ni. Kapti ilin aux ne, tio koncernas cxiun homon, kiu scipovas bone plugi la grundon de vivo per sia libera elektopovo.

Se Dio donis al ni la privilegion de libera elektopovo, tamen Li instruis al ni la sencon de respondeco, kiun ni devas neniam flankenlasi, por nia propra bono.

Troa skepticismo estas la intelekta ekvivalento de religia fanatikeco.

Plej granda bono, kiun la Plejalta Kreanto povas doni al la homo estas interna Paco, kiun nenio en la mondo povas anstatauxi. Kiu havas Pacon, tiu havas forton, cxar li kunportas Dian Povon en la koro.

# Internacia lanĉo



La furoraĵo de Paiva Netto *Meditadoj el la Animo* jam estas disponebla en Esperanto.

**B**razila ĵurnalisto kaj verkisto kun pli ol 4 milionoj da libroj venditaj, Paiva Netto lanĉas la 9an de julio, dum la 8a Tutamerika Kongreso de Esperanto, la atendatan furoraĵon *Meditadoj el la Animo*, tradukitan al Esperanto fare de Eldonejo Elevação. Grava instiganto por diskonigado de la internacia lingvo, Paiva Netto ricevis la distingajon “Arĝenta Plato” de Universala Esperanto-Asocio (UEA), okaze de la inaŭguro de la Templo de Bona Volo (TBV), en oktobro 1989. Tiu elstara premio troviĝas en ekspono en la Memorigejo omaĝanta la ĉefgvidanton de LBV, unu el la ĉambroj de la Monumento.

Pli ol 400 mil ekzempleroj de la verko jam disvendigis en Brazilo kaj en Portugalio, kaj ĝi fariĝis atentigaĵo en la ĉefaj mondaj literaturaj eventoj, kiel en la 80a Libro-Foiro en la